

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 113, junio 2014

Niaj proverboj

(Më mirë shëndet, se mbret) *Pli bone sana ol reĝo*

(Mendja rrehet, barku s'rrehet) *Oni la menson trompas sed ne la ventron*

(I mençuri rrihet me fjalë dhe budalli me dru) *La saĝulon forbatas per vortoj dum la malsaĝulon per bastono*

Adreso de redakcio: *p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)*

Kunlaborantoj: *Shaban Hasani 00355682080677, shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: 0035583222326, gjergji_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430, agimperaj@yahoo.it; Sajmir Beqiraj: (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com; Nehat Sokoli: 00355682587699, sokolinehat@gmail.com; Engjell Gusho: 00355692350111, engjellgusho@yahoo.fr; Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ; Luan Jaupi: 00355682165870, luanjaupi@hotmail.com; Enkela Xhamaj: 00355685135105, xhamajkl@yahoo.com; Martha Otto, 00355697946646,*

La enhavo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Pagis la kotizon

Ni dankas

Livero de libroj

Projekto Lingbolançilo en Albanio

Informilo de UEA

La Tago de la patrina lingvo

Kapabligo je univeristata nivelo

Korespondi deziras

Nova membro

El nia movada historio kun fotoj

Didaktiko

Nia propagando

Pele pri Esperant

Etcuo Miyoshi pro lingvoj

Skribu al Papo

Esperanto TV-kanalo en Australio

55-a datreveno de E-redakcio en Radio Varsovio

Ĉu Esperanto por abiturienta diplomo en Francio?

TATOEBA – granda sukceso de Esperanto

El la leteroj

Albanio, Svedio, Brazilo

Informaĵoj

ROMAN DOBRZYŃSKI - MARATONANO DE PRELEGOJ

Konkurso de mallongaj filmoj

Aktivecoj en Gresillion

Artikoloj

Ni ne estas robotoj

Turismvojaĝo tra Bona Volo

Genocido dum du jarcentoj

Beletraĵoj

Dritero Agolli

Gezim Ĉela

William Palmer

Ni kaj UEA, AIS, ILEI

Pagis la kotizon

Martha Otto 500 L por la jaro 2014

La kasisto


Ni dankas

Ni dankas Esperanto-asociacion de Britio kaj s-inon Angela Tellier kiu donacis ekzempleron de la libro "Esperanto as a starter language".



Livero de libroj

Okaze de sia vizito privata al Milano s-ro Bardhyl Selimi liveris ĉe la Itala Esperantista Asocio (FEI) 30 ekzemplerojn de la Novelaro "Sloganoj" de Ylljet Aliĉka. Ĉikaze li havis interesan interparolon kun la tiea deĵoranto s-ro Livio.



Ĉe la domo kie estas la sidejo de FEI

Projekto de Lingvolanĉilo

Letero al Angela Tellier

Bonan tagon kara, estas plezuro por mi alskribi rekte al vi. Mi ĉeestis UK Florenco en la jaro 2006 kie mi havis la okazon aŭskulti vian diskuton pri la Lingva lanĉilo, kio ĉiam altiris ankaŭ mian atenton.

En Albanio la oficiala lingva politiko favorigas la anglan kompare al la ceteraj "grandaj" lingvoj kiel la itala, franca, germana, hispana, des pli al Esperanto. Tiel estas malfacile por nia asocio varbi simpatulojn kaj novajn membrojn, aŭ starigi lernokursojn en la lernejoj, kion ni sukcesis fari en la unuaj jaroj post la malfermiĝo de Albanio al la mondo (1991). Des pli post la jaro 2010 kiam albanoj estis liberaj moviĝi tra la Ŝengen zono sen vizoj.

Aktuale ni sekvas du strategiojn:

1. Traduko al Esperanto de la plej konataj modernaj albanaj beletraĵoj
2. Invito de la fremdaj profesoroj esperantistoj por prelegi en niaj universitatoj en Esperanto pri temoj sciencaj aŭ socialaj.

Lastatempe vizitis Albanion la mondekonata ŝakludisto Garry Kasparov kiun atendis mem la ĉefministro Edi Rama. Li proponis la enkondukon de la ŝakluda lernilo en kelkajn bazlernejojn esperante tiel plikapabligi la gelernantojn niajn por pli bone studi.

Sekve nia ministerio pri edukado decidis apliki ĉi tiun projekton, komencante de septembro, almenaŭ en dek bazlernejoj.

Tuj ni kaptis la okazon kaj kompilis proponon por la ministerio pri edukado por enkonduki esperanton kiel propedeŭtika lingvorimedo en kelkajn bazlernejojn. Nun ni atendas respondon. Eble tio estos negativa ĉar ne temas pri ia financa subteno kiel en la kazo de Kasparov (mi supozas ke tiu sinjoro disponigis iun monsumon tiucele). Sed eble la respondo estos pozitiva se la nova registaro estas pli viziema ol la antaŭa...

Ni klarigis la paŝojn de la estiĝo de nia projekto: starigo de intensa lernokurso kun grupo de instruistoj de fremdaj lingvoj (aparte de la rusa, kiu ne plu instruitas en niaj lernejoj, sekve la instruistoj restis senlaboraj); tiucele ni invitus ankaŭ profesorojn el ILEI; disdonadon de lernolibroj de esperanto por albanoj (jam ekzistas almenaŭ tri lernolibroj sufiĉe bonaj ĉi tie); elekton de la bazlernejoj ĉefe en Tirana, Durres, Shkoder, Korĉa, Vlora, Elbasan, Lezhe (kelkaj niaj urboj); enkondukon de esperanto en tiuj bazlernejoj enkorpigita en la instruplano, dum almenaŭ unu duonjaro.

Certe, ni ege bezonus, por antaŭenigi la aferon, ankaŭ vian helpon: je formo de sperto ĝisnuna en Britio kaj alilande, problemoj naskiĝintaj, rezultatoj pozitivaj akiritaj, lernomaterialoj plej efikaj, ktp.

Do, ni dezirus resti en kontakto kun vi.

Esperante ke mi estis iom klara, mi bondeziras belan labortagon kaj atendas reagon.

Ĝis Bardhyl Selimi, albana ILEI sekciestro, sekretario de la albana esperanto asocio.

Respondo de David Curtis

Dankon pro via lastatempa mesaĝo, rilate al kiu mi plusendis viajn vortojn al samideanino Angela Tellier, kaj ŝi ĵus respondis al mi, ke ŝi jam skribis private al vi, klarigante ke la brita eduko-sistemo unikas.

Mi aldonu, ke la brita registaro lasas multajn aferojn al ŝtataj lernejoj, kvazau ili estas tute sendependaj de la ŝtato.

Mi aldonu, tamen, ke en unu el la elementaj lernejoj en kiuj mi instruis, la lernejestro estis ege entuziasma ŝakludisto. Tial li kuraĝigis ĉiujn el siaj lernantoj evoluigi la logikajn lertecojn per ŝakludo. Li eĉ aranĝis konkursojn inter sia lernejo kaj aliaj lernejoj en la urbo. Sed la afero limiĝis al la lernejoj kies lernejestroj estis liaj geamikoj. La nacia registaro ne aranĝis tion.

Tamen, ne estas ke la brita registaro neniam provas ordoni elementajn lernejojn. Ĉi-jare, ekzemple, la brita registaro metis en la nacian instruprogramon, ke ekde la venonta septembro, kiam komenciĝos la nova eduko-jaro, ĉiuj elementaj lernejoj instruu fremdan lingvon.

Sed ĉiu lernejestro, lau la brita sistemo, liberas obei au malobei tiun parton de la nacia instruprogramo.

Konsekvence, mi jam provis ke estas senutile skribi al la ministerio de edukado en Britio, petante ke tiu fremda lingvo estu Esperanto. Mi private skribis al ĉiu el la sesdek lernejestroj en mia distrikto, urĝante ke ili aranĝu kun Esperanto-Asocio de Britio ke la bonega projekto de Angela Tellier estu sekvata venontseptembre.

Estis ŝanco ke unu el tiu sesdekaro akceptus mian proponon, sed bedaŭrinde ne. La kialo estas ke tra Britio estas ĝenerala supozo ke Esperanto rivalas la anglan, kaj tial perdiĝis, ĉar la anglan subtenas ĉiu angleparolanta registaro tramonde, ĉefe la usona.

Lau mia informo, tiu ideo ekkreskis post la unua mondmilito. Ĝis la fino de tiu milito, la franca dominis, sed Usono ebligis la venkon pro ĝia riĉeco, kaj homoj pli favoris la lingvon de usonanoj ol la lingvon de francoj kaj belgoj. La trakton de Versailles oni ne skribis en la ĝis-tiam-domina lingvo, la franca, sed en la usona lingvo: la angla.

Flankafero (lau mi) estis ke britaj instruistoj pri la franca malaprobis Esperanton ĉar ĝi estis rivalo al la franca lingvo. Estas fakto ankoraŭ nuntempe, ke tiaj instruistoj, demandate de siaj lernantoj ke ili komentu pri la valoro de Esperanto, ĝenerale mokas ĝin kaj ĝenerale rifuzas priinstrui ĝin, dirante: "Ĝi estas artefarita lingvo, sen kulturo."

Konsekvenca, Esperanto estas preskaŭ nenie instruata en britaj duagrada lernejoj. Angela Tellier estas lingvo-instruistino, kaj ŝi estas escepta.

Amike, David

Noto: S-ino Angela Tellier respondis afable sendante ankaŭ ekzempleron de sia libro por prezenti al la ministrino pri edukado de Albanio, s-ino Lindita Nikolla Shaban Hasani

Esperanto kaj UN

Informilo de la Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj

La Prezidanto de UEA prelegos ĉe lingva simpozio

“Lingvo kaj Egaleco” estos la temo de simpozio organizata de la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazos ĉe 777 United Nations Plaza mardon, la 29-an de aprilo 2014. La simpozio pritraktos neegalecojn en edukado, neegalecojn en internacia komunikado, kaj demandojn pri lingvopolitiko je nacia kaj internacia niveloj. Profesoro Mark Fettes, nove elektita kiel prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, prezentos la ĉefan paroladon. Prof. Fettes, kiu estas fakulo pri lingvaj demandoj en edukado, precipe rilate minoritatojn, estas profesoro pri edukado ĉe la Universitato Simon Fraser, en Vankuvero, Kanado. Lin akompanos pluraj elstaraj parolantoj, kiel ekzemple Terrence Wiley, prezidanto de la Centro de Aplika Lingvistiko en Vaŝingtono, kaj Daniel Ward, redaktoro de la usona revuo *Language Magazine*. Fakuloj el pluraj landoj kontribuos referaĵojn, interalie el Aŭstralio, Belgio, kaj Britio. Pliaj subtenantoj de la simpozio estas la Universitato de Hartford kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kiu eldonas la revuon *Lingvaj Problemoj kaj Lingvoplanado (LPLP)*. Detaloj pri la simpozio troveblas ĉe <http://www.languageandtheun.org/>.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne).

Plie al: la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, Regionaj Komisionoj, listoj kaj unuopuloj Estraro laboris, kunlaboris

La printempa estrarkunsido de la estraro de UEA okazis lastsemajnfine (28-30 marto) en la Centra Oficejo en Roterdamo. Ses el sep estraranoj ĉeestis fizike, nia ĉilia estrarano José Antonio Vergara partoprenis skajpe, kiel ankaŭ dum iom da tempo la redaktoro de la revuo, Fabrício Valle, la prezidantino de ILEI, Mirejo Grosjean, Katalin Kovats de <edukado.net> kaj la KER-ekzamenoj kaj LKK-anoj el Lillo. Por TEJO engaĝiĝis surloke Veronika Poór. Kiel kutime partoprenis la direktoro de la oficejo, Osmo Buller, plus pliaj oficistoj laŭbezono. La kunsidojn gvidis la prezidanto de UEA, Mark Fettes.

Ege resume... Estrarano Lee Jungkee raportis pri la sukcesa Unua Irana Kongreso, kiun li vizitis survoje al Nederlando. Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer simile raportis pri la unua Kongreso de Nikaragvo. Ni planas faciligi la vojon por novaj asocioj pretigi siajn aliĝpetojn al la Asocio. Ni diskutis multe la aktivigon de nova aspekto por la retejo de UEA kaj modernigon de la libroserva oferto. Ni aŭdis freŝajn evoluojn pri la sekvontaj kongresoj; esploroj pri 2016 estas farataj, cele al decido ene de la sekvaj monatoj. Laste ni studis buĝetproponon por 2015 kaj faris intervenojn por malaltigi (ĉefe estrarajn) kostojn kaj pli optimismi ĉe donacoj, tiel ke pli da rimedoj fluu al Movada Evoluigo, konforme kun la prioritatoj de la Strategia Plano.

La supra raporto estas nur resuma. Pli oficiala, aprokata raporto estas verkita; ĝi kovras ĉiujn signifajn diskutitajn terenojn, tion tre baldaŭ ricevos ĉiu komitatano kaj komisionano, rekte de la prezidanto.

Plia estraro, eĉ tuje

La estraro de TEJO kunsidos en Novara, Italio, tre baldaŭ poste (11-14 apr.). La observanto de UEA estos, kiel same lastnovembre, la vic-prezidanto, Stefan MacGill, cele al daŭrigo kaj intensigo de la kunlaboro inter UEA kaj TEJO. Tio rilatos unuavice al la programo de AMO-seminarioj, ĉar TEJO jam havas ampleksan programon de aktivula trejnado, kiu povas utili al UEA. Alia komuna temo estas la starigo de rete bazita inform-kolektilo por ekhavi pli bonan bildon pri la atingoj, bezonoj kaj obstakloj en niaj Landaj kaj Fakaj Asocioj. TEJO uzas projekton KODEJO tiucele; UEA aspiras transiri de permana inform-arigado al pli aŭtomata sistemo.

Kreskanta kunlaboro – neatendita AMO

Ŝajnas, ke en 2014 okazos jam sep AMO-seminarioj (vidu sube); ĉiu nun havas sekuran (sed modestan) financan apogon de UEA.

El la kunsidoj venis surpriza ideo, ke la nunjara Internacia Junulara Kongreso en Fortalezo, Brazilo, (18-25 julio) provizos per ideala loko okazigi AMO-seminaron. Konvenaj publiko kaj gvidantaro jam troviĝos surloke, kaj tio kontentigas la jam esprimitan deziron, ke ankaŭ Sud-Ameriko gastigu sesion. Tiu seminario por nun ne eniros la numer-vicon, kaj fariĝos AMO-IJK.

Sekvos serio da impresoj kaj materialoj pri la okazinta AMO-1 en Horány, Hungario. Al la gvidintoj kaj kunorganizintoj en HEJ, ni reeĥas la ĵus senditajn dankojn de UEA.

Pri AMO-2 en Sidneo, Kanado, klaku <http://esperanto-AMO-2>.

Pri AMO-3 en Siano, Ĉinio, klaku <http://www.esperanto.cn/amo/>

Pri AMO-4 en Fai della Paganella (Trento), Italio, klaku <http://kongreso.esperanto.it>.

Pri pliaj jarfinaj seminarioj ni informos baldaŭ.

LA cirk 2014-04-02 Neatendita amo.doc

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.

Alkrochte la sama enhavo kiel PDF, sed kun bonaj titoloj kaj fotoj el la estrarkunsido.

Tago de la patrina lingvo

<http://www.unesco.org/new/en/international-mother-language-day/>
<http://www.unesco.org/new/en/international-mother-language-day/>

La Ĝenerala Direktoro de Unesko festas Internacian Patrinlingvan Tagon en ok lingvoj ... inkluzive Esperanton

Ŝirmado kaj antaŭenigo de patrinaj lingvoj estas ŝlosiloj al monda civitaneco kaj aŭtentika reciproka kompreniĝo, laŭ Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, en ŝia mesaĝo okaze de la Internacia Tago de la Patrino Lingvo, la 21-an de februaro 2014. "Kompreni kaj paroli pli ol unu lingvon kondukas al pli granda kompreno de la abundaj kulturaj interagoj en nia mondo," ŝi aldonis. Ŝia mesaĝo, kiu emfazis edukadon radikiĝintan en la kultura kaj lingva heredaĵo de junaj homoj, estas forta konfirmo de la multlingvismo subtenata ankaŭ de Universala Esperanto-Asocio. Laŭ ŝi, ekskludi lingvojn implicas ekskludi tiujn homojn, kiuj parolas tiujn lingvojn. La ĉi-jara mesaĝo de s-ino Bokova aperis en la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, plus du pliaj lingvoj gravaj pro sia simboleco kaj pro sia praktika graveco – ŝia propra patrino lingvo, la bulgara, kaj la Internacia Lingvo

Esperanto. Tiu kunlabora rezulto atestas pri la forta rilato inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio kaj la streboj de la Asocio subtene al lingvaj rajtoj

Kapabligo je universitata nivelo

La rubriko 'Malferme' de la maja numero de *Revuo Esperanto* (RE) esploras raporton de Unesko pri la stato de monda edukado, elstarigante la fortan korelacian inter la bona trejnado de instruistoj kaj studenta sukceso. Apoga artikolo esploras la oferton por tia trejnado por E-instruistoj, i.a. je oficialigita universitata nivelo.

Pri la stato de universitata agado rilate al Esperanto oni povas veplori (kiel en RE de marto 2014), aŭ defendi (RE aprilo 2014). Prefere al plorlarmoj, ni subtenu tion, kio ja ekzistas delonge, kaj kiu estis pene atingita. UEA havas taskon ne nur malfermi novajn terenojn, sed ankaŭ protekti kaj flegi jamajn sukcesojn.

Tial ni tiras la atenton al la tri-jara universitata kursaro en Poznano, Pollando, kiu portas oficialan agnoskon kaj ludas gravan rolon en la kreo de pli kapablaj instruistoj de nia lingvo. Ĝuste ĉi-jare plia tri-jara studado venos al sukcesa fino (post 15-jara tradicio), kaj en septembro 2014 estos la momento pretigi novan proponon, kiu povos funkcii kondiĉe je sufiĉa aliĝado. Jen bazaj faktoj pri la kursaro, de Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj (IS) kaj membro de la Akademio de Esperanto:

La pola Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano jam de 1998 regule ofertas siajn 3-jarajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio en ekstera formo: nur unu intensan semajnon necesas pasigi en UAM ĉiusemestre, inter la sesioj la laborado okazas kun la helpo de la kursgvidantoj kaj per reta lernado. La tria jaro ebligas specialiĝojn: pri internacia kaj interkultura komunikado, interlingvistiko, lingvistiko kaj literaturo de esperanto, tradukado kaj instruado. La lasta estas tre grava kaj la plej altnivela formado de esperanto-instruistoj.

Tiu tria jaro ebligas specialiĝon pri instruado de esperanto – kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net, kie vi akiras sisteman superrigardon pri la instrua procezo kaj detalan metodaron de instruado de esperanto en aktiva formo. La riĉa programo prezentos interalie ankaŭ la instruhelpilojn (instruista kofro), la modernan teknologion en instruado (retkursoj), la organizadon kaj planadon de diversaj kursoj.

Informoj troviĝas sur la retpaĝoj de IS: <http://www.amu.edu.pl/~inter/> kaj peteblas ĉe: interlin@amu.edu.pl. Plie, aperas informoj en RE de majo 2014 kaj en numero 2014-2 de Internacia Pedagogia Revuo (IPR). Aliĝu rapide, sed plej malfrue ĝis la 15-a de aŭgusto!

UEA engaĝas sin pli forte en la sukcesigo de la nova kursaro, kunlabore kun *Esperantic Studies Foundation* (ESF). Nova interkonsento estas akceptita inter la tri partioj, kiu ne nur certigas financadon por kelkaj stipendioj, sed krome disponigas rimed(et)ojn por fortigi la administradon ĉirkaŭ la kursoj. La dokumento starigas plie tri-personan Komisionon por gvidi la kunlaboron inter la tri organizoj. Tiu komisiono tre baldaŭ anoncos detalojn pri la stipendia programo por la kursaro 2014-2017. Stipendipetoj devos alveni ĝis la unua de julio, 2014.

Kiel signo de tiu fortigita engaĝigo, spektu alvokon de la prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes, je:

<http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=246>, Videbla ankaŭ ĉe

<https://www.youtube.com/watch?v=yUYQUDbfbNo>, kie troviĝas pliaj filmoj pri la kursaro.

Pliaj filmoj:

<https://www.youtube.com/watch?v=dNt4B0bHNDE>

<https://www.youtube.com/watch?v=2x2hf3Bho4>

<https://www.youtube.com/watch?v=NUEKadaJetg>

Ni vokas al Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA, kaj landaj sekcioj de TEJO kaj ILEI: konigu la kursaron inter viaj membroj kaj kuraĝigu partoprenon. Bv. ekzemple plusendi la alvokon al viaj membroj aŭ afiŝigi la PDF-version en viaj retejoj.

Pro la fakto, ke la internaciaj stipendioj ne povos kontentigi ĉies bezonon, konsideru la eblon oferti mem subtenon al viaj membroj – tio efektive jam sukcese okazis. Estas en via propra intereso havi en via lando aŭ fako pli alte kvalifikitajn ekspertojn kaj instruistojn.

Korespondi deziras

Kiu volas korespondi kun ILI ? Ili estas kubanoj ? Skribu por viaj gelnantoj ankaŭ. ktp.

dankon

Jen miaj adresoj:

Mia hejmo :

Ismary Lezcano García

Gervasio 354 entre San Miguel y San Rafael, Centro Habana, 10300, La Habana, Cuba. (ĉi tie mi loĝas)

Apartado 3047, Zona Postal Habana 3, La Habana, Cuba.

Nova membro

Mi nomiĝas Martha Otto, estas mondcivitano, sed ankaŭ 'Vlonjate'. Kial?

Mi alvenis en Albanio la unuan fojon por Balkana Konferenco organizata far la Bahaa Nacia Asambleo de Albanio en Tirana. Vojaĝinte tra la tuta lando kaj renkontinte multajn afablajn Albanojn, mi dufoje revenis kun mia aŭteto plena je ludiloj, libroj, medikamentoj. En 1996 mi decidis translokiĝi de Germanio, kie mi vivis dum du jaroj post jaroj en Sud-Azio. La urbo, kion elektis mia koro, estis Vlora. Baldaŭ mi trovis amikojn tie, helpemajn najbarojn kaj studentojn por la angla, germana aŭ franca lingvoj. La civila milito (ĉu ribelo pro la disfalo de Ponzaj Piramidoj?iel interrompis tiun agadon, kaj poste, en 1998 mi komencis klasojn de morala edukado por infanoj kaj junuloj, samkiel Kuraĝigada Trejnado por virinoj kaj instruistoj.



Kun Martha en Tirana 2013

Jam en 1995 mi renkontis Zef Mjeda en Shkodra, Agim Peraj en Lezha kaj alian Esperantiston en Tirana, kies nomon mi forgesis. ĉu Gafur Muĉo aŭ Vasil Pistoli? Sed mia ĉefa kaj precipa Esperanto-amiko estis Bardhyl Selimi. Ĉiam kiam mi estis en Tirana, ni kune babilis, kaj li invitis min partopreni aranĝojn en lia lernejo aŭ aliloke. Dum la jaroj 2004 ĝis 2013 oni invitis min servi en la Bahaa Mondcentro en Haifo, Israelo, kiel gvidistino de pilgrimantoj el la tuta mondo. Ekde la komenco mi kontaktis la

lokajn/regionajn Esperantistojn, kiuj regule renkontiĝis en mia loĝejo unu foje monate. Krome mi partoprenis en multaj Israelaj Landaj Kunvenoj kaj ekskursoj al elstaraj lokoj kiel la Norda Galileo, la Morta Maro aŭ Jerusalemo. Dum mia servado en la Mondcentro mi ofertis E-o kursetojn al kelkaj interesuloj ĉu interesitoj? inter la ĉa. 600 volontuloj tie, kaj sufiĉe regule ni organizis Esperanto-lunĉojn. Eĉ inter pilgrimantoj ofte troviĝis samideanoj el diversaj landoj.

Lastan jaron, kiam okazis la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto en Israelo, samkiel la Azia Kongreso, mi havis la bonŝancon gvidi du grupojn venintaj por viziti la Bahaajn terasojn kaj ĝardenojn en la Monto Karmelo.

Lastan jaron, post 9 jaroj, mi revenis al Vlora, restaŭrigis mian loĝejon kaj rekomencis kontakti najbarojn. Ekstaris grupo de junuloj kun programo de morala edukado, kaj okazas regulaj kunvenoj kun la patrinoj kaj amikinoj dum ni babilas pri interesaj temoj, ekz. kuraĝigado, spirita trankvilo, vortoj de Patrino Tereza, senco de la vivo, kiel reagi al kalumniado, problemoj, konfliktoj, ktp.

Kvankam estas malfacile sufiĉe interesiĝi ĉu interesiĝi? junulojn por la internacia lingvo, ĉar la gepatroj preferas ke ili lernu ian 'utilan lingvon', mi nun havas 12-jaran studenton de la germana, kiu memstare komencis lerni la lingvon pere de 'lernu!' Do mi certe pretas helpi lin!

Espereble ni baldaŭ renkontiĝos dum iu albana Esperanto-aranĝo!

Mia retadreso estas: martha.otto@gmail.com

El nia E-movada historio kun fotoj



E-kurso en la hejmo



Esperanto kursoj en la lernejoj



Albana Bime kaj Alda Tole antaŭ 20 jaroj

Didaktiko

Neniama uzu akuzativon post la prepozicioj: al, ĝis, de, da, por, pro, per, sen, kun, pri

Mi ne ŝatas vin, prepozicioj

La prepozicioj: en, sub, sur, super, ĉe, antaŭ, post, inter, apud, ĉirkaŭ, ekster kaj kelkaj aliaj akceptas la akuzativon por monstro de direkto.

facebook.com/esperantajnotoj

to eat	manĝi
meal	mango
eating	manĝado
food	manĝaĵo
cuisine	manĝaĵaro
edible	manĝebla
inclined towards eating	manĝema
to feed	manĝigi
an item of cutlery	manĝilo
recommended for eating	manĝinda
one who is eating now	manĝanto
one who has eaten	manĝinto
one who is to eat in the future	manĝonto

Pomo Fenestro
 Rozo Kraĵono
 Suno Plumo
 Arbo Ĉapelo
 Birdo Leono
 Libro Hundo

Diversaj vestaĵoj

La unua, kiu alvenos hejmen, estos la gajninto, ĉu vi konsentas?

Konsentite!!!

Mi gajniĝis!!!

Ho! FEK!!!

Post la prepozicioj: 1-16 ne uzu akuzativon kaj 17-18 ne uzetru ne.

Allaj prepozicioj: *19-Anstataŭ *20-Antaŭ *21-Apud *22-Cirkaŭ *23-Ekster *24-En *25-Inter *26-Kontraŭ *27-Krom *28-Po *29-Post *30-Spite *31-Sub *32-Super *33-Sur *34-Trans



Esperanto, mia Lingvo

NEDIFINA ARTIKOLO

Knabino dancas en la salono.

Varma lakto estas bona.

Hundo kuras en la plaĝo.

ESPERANTO BRAZILIO

VERBO PUŜI:
Konjugacio!

MI puŝas
VI puŝas
LI falas
NI ridas
LI stariĝas
NI forkuras

ENGLISH		ESPERANTO	
singular	plural	singularo	pluralo
table	tables	tablo	tabloj
piano	pianos	piano	pianoj
tomato	tomatoes	tomato	tomatoj
church	churches	preĝejo	preĝejoj
conch	conchs	konko	konkoj
tornado	tornado(es)	tornado	tornadoj
city	cities	urbo	urboj
woman	women	virino	virinoj
child	children	infano	infanoj
person	people	persono	personoj
tooth	teeth	dento	dentoj
mouse	mice	muso	musoj
belief	beliefs	kredo	kredoj
wolf	wolves	lupo	lupoj
dwarf	dwarfs/dwarves	nano	nanoj
elk	elk	alko	alkoj
thanks	thanks	danko	dankoj
-	eyeglasses	okulvitro	okulvitroj
snow	-	neĝo	neĝoj
mathematics	-	matematiko	matematikoj
encyclopedia	encyclopedias	enciklopedio	enciklopedioj
bacterium	bacteria	bakterio	bakterioj
bacillus	bacilli	bacilo	baciloj
analysis	analyses	analizo	analizoj
index	indices	indekso	indeksoj
phenomenon	phenomena	fenomeno	fenomenoj
Brazilian	Brazilians	brazilano	brazilanoj
Chinese	the Chinese	ĉino	ĉinoj

Nia propagando

Pele pri Esperanto

Pelé 'Esperanto estos tre utila al chiuj sportistoj por alproksimigi ilin kaj faciligi al ili la amikecajn kaj sportajn rilatojn'.

<http://languagequality.blogspot.jp/>

Ĉu tio estas vera



Etsuo Miyoshi

Vaste oni kredas, ke la franca estas logika, la araba netradukebla, la hispana facile lernebla, la dana stranga, la itala belsona, la angla praktika, demokratia kaj seksisma, la hebrea sankta, la bengala kultura kaj Esperanto neŭtrala. Ĉu tio estas vero?

<http://languagequality.blogspot.jp/>

Etcuo

Skribu al Papo

Eble estus tre utile, se ankaŭ la esperanto-asocioj de Eŭropo kaj tiuj de la tuta mondo sekvus la ekzemplon de Giorgio Pagano, skribante pri Esperanto al la Sankta Patro...

Unuflanke estas salutinde, ke Papo Francisko donas sian benon nur itale, ĉar tiel Li alvokas la atenton de la tuta mondo, ke ne nur la angla lingvo ekzistas.

Aliflanke estas malagrade por ni, por-esperantaj agantoj la malaperigo ankaŭ de la Internacia Lingvo el inter la lingvoj de la beno "Urbi et Orbi".

Ĉu la esperantlingvaj programoj de la Radio Vatikana ankoraŭ ekzistas?

Multsalute
Ludoviko Molnár

ERA sendis la jenan leteron al Sankta Patro okaze de la sanktuligo de papo Johano Paŭlo II.

Subjekto: Sanktuligo de Papo Johano Paŭlo II, la Papo de Esperanto (ankaŭ).

Eminentega Sankta Patro, estas ankoraŭ radikalulo kiu hodiaŭ "ĝenas", radikalulo fastanta ekde 15 tagoj favore de la itala lingvo. Jes, ĝuste favore de tiu itala lingvo, per kiu Vi amas tre multe esprimi vin, sen kiu ni italoj ne estus popolo. Oni scias, kiam la Profito ne estas "konvena" por submeti popolon masakrante la korpojn, por certigi al si multe pli grandajn gajnojn ol pere de geografia konkero de iliaj teritorioj aŭ de ilia sklavigo, oni atentis al iliaj mensoj, bombardante ilin fare de la armiloj de la amasa konvinkigo - la amaskomunikiloj - kaj, pere de la mortigo de la lingvo, oni certigas al si ĝian finan neniigon.

Nu por garantii la lingvan dominadon de la angla oni alvenis, en Italio, al la punkto malpermesi instrui en la itala, kiel en la kazo de la Politekniko de Milano, apogita de la Ministerio de Edukado kaj de la nuna ministro Stefania Giannini, problemo kiu estas precize la kialo de mia malsatstrikto.

Tamen, okaze de Pasko de 1994, ĝuste 20 jarojn antaŭe, por eviti precize tion, kio estas okazanta hodiaŭ al la lingvo de la itala popolo (kaj ne nur al ĝi), konsiderante la sentemon de la pola papo pri la temo, kune kun Marco Pannella kaj Emma Bonino mi adresis al Johano Paŭlo II la inviton por ke li inkludu Esperanton inter la lingvoj de la kutima gratula mesaĝo, kiel la lingvo de neperforto, de paco kaj de dialogo inter malsamaj kulturoj kiuj, kontraŭe, riskis pere sub la inundo angleparolanta. Signalo plia kaj konkreta, fakte, favore de tiuj, kristanoj aŭ ne, kiuj laboras por la kompreno kontraŭ la malamo, por la dialogo kontraŭ la perforto.

Nu la "miraklo" okazis kaj, unuafoje, en Placo Sankta Petro resonis la gratulaj vortoj de Pontifiko en Esperanto. Kaj ili ankoraŭ resonadis dum la tuta Papregado de Karol Wojtyła kaj de Jozef Ratzinger.

Ĉi tie, mi petas, Sankta Patro, rememori ankaŭ tion dum la ceremonio de kanonizado de Johano Paŭlo II, tiun malgrandan sed signifoplenan helpon donitan de Papo Johano Paŭlo II kaj daŭrigitan de la Papo Emerita, apoge al komuna lingvo de la homaro kiel komuna raso.

Ni estos en Placo Sankta Petro, mi esperas videblaj ankaŭ de Vi, kun tolostrio kun la bildo de Johano Paŭlo II benanta kaj la vortoj

W LA PAPO ESPERANTISTA!

Bonvolu plezure akcepti, Via Sankteco, la certigon de mia plej alta Estimo kaj miajn plej respektplenajn Salutojn,
La Ĝenerala Sekretario de la Esperanto-Radikala Asocio,
Giorgio Pagano

Esperanto TV-kanalo en Australio

Sidnejo, Aŭstralio: La sola IPTV-kanalo de la mondo en la internacia lingvo Esperanto debutos la kvinan de aprilo 2014.

Ĉi tiu nova televid-kanalo estos elsendita per alt-rapida Interreto kun IPTV-teknologion. Ĝi estos disponebla tutmonde per ĉiuj iloj, kiuj havas alt-rapidan Interretan konekton, t.e. Interret-ebligataj televidiloj, komputiloj, tabulaj komputiloj kaj [lertaj] poŝtelefonoj (Android kaj iOS), kaj pluaj plivastiĝo kaj klienta subteno estas planataj por aliaj kontinentoj meze de 2014.

La enhavo estos plejparte en la internacia lingvo Esperanto, kaj konsistos el originalaj aŭ dublitaj unikaj kaj allogaj programoj, kaj ankaŭ zorge elektitaj filmetoj kreitaj de kontribuantoj ĉirkaŭ la mondo.

La ĉefa celo de la nova elsenda kanalo "Esperanto TV" estas liveri allogan enhavon al ĉiuj niveloj de parolantoj de Esperanto, de komencantoj ĝis denaskaj parolantoj. Kelkaj programoj estos ankaŭ en aliaj lingvoj, kiel ekz-e lingvaj kursoj por anglalingvanoj.

"Esperanto TV" estas rezulto de kunlaboro inter la sidnej-baza Language Festival Association (Asocio de Lingvaj Festivaloj) kaj la aŭstralia amaskomunika kompanio iStreamStudios. Reprezentanto de la estraro de "Esperanto TV", Richard Delamore priskribas ĝian celon kiel "Servi kaj kreskigi la esperantan komunumon ĉirkaŭ la mondo, kaj ankaŭ provizi al ne-esperantistoj enrigardojn en ĉi tiun unikan komunumon.

55-a datreveno de E-redakcio en Radio Varsovio

La 55-a datreveno de la kreiĝo de la unua profesia E-Redakcio de Pola Radio kaj ĝiaj elsendoj pasanta 4-an de aprilo 2014 estas la ĉeftemo de la 322 elsendo de la Pola Retradio. Tiukuntekste ni prezentas ampleksan programeron kun la antaŭmikrofonaj intervenoj de kelkaj el la malnovaj kaj dukaze ankaŭ aktualaj redakoroj de niaj programoj: Gabi Kosiarska, Andrzej Pettyn kaj Milada Szewedo. Nia aparta gasto estas la Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller. Komence de la elsendo ...

Barbara Pietrzak

Ĉu Esperanto por abiturienta diplomo en Francio?

En 2011-2012 la francaj Esperanto-asocioj SAT-Amikaro kaj Espéranto-France kolektis pli ol 33.000 subskribojn al petskribo, ke Esperanto estu akceptata kiel nedeviga fako por abiturienta diplomo.

En Francio fine de la mezlernejo, 18-jaruloj trapasas ekzamenon kun maksimume tri lingvaj fakoj, devigaj kaj nedevigaj. Inter la nedevigaj estas elekteblaj sesdeko da lingvoj, kelkaj por parola ekzameno, sed plimulto por skriba ekzameno. La francaj samideanoj petas, ke Esperanto estu akceptata por skriba ekzameno, t.e. teksto 30-linia en la fremda lingvo, pri kiu la kandidato respondu kvar demandojn, verku kelkajn liniojn de "persona esprimo" kaj traduku al la franca dekon da linioj, entute dum du horoj. La nivelo estas inter B1 kaj B2.

La petskribon subskribis dekoj da deputitoj, multaj famuloj, urbestroj... vidu: <http://esperanto-au-bac.fr/>. Delegacio kvinhoma: Emmanuel Debanne (*kunordiganto de la kampanjo*), Guy Cavalier (*prezidanto de SAT-Amikaro*), Axel Rousseau (*prezidanto de Espéranto-France*), François Lo Jacomo (*akademiano kaj ekzamenanto*) kaj Dorian Reale-Caron (*16-jara lernanto*), oficiale portis la tuton al la ministerio pri edukado la 21-an de marto.



La delegacion akceptis Isabelle Robin, oficejestro pri mezlernejoj, kiu mem ne rajtas decidi tian aldonon de abiturienteca fako, sed raportos pri la 70-minuta diskuto al la decidopova direktoro pri mezlerneja instruado (DGESCO) kaj al la konsilistoj de la ministro.

Isabelle Robin rakontis, ke kelkajn tagojn pli frue ŝi akceptis kurdan delegacion, kiu same petis, ke la kurda lingvo estu akceptata kiel nedeviga fako en abiturienteca ekzameno. Ŝi memorigis, ke 98 % de la lingvo-ekzamenoj koncernas 4 lingvojn, do ĉiuj aliaj estas "maloftaj lingvoj" (inkluzive, ekzemple, la ĉina). Krome tia decido ne estas tiel simpla, ĉar necesas, ke la Ĝenerala Inspektoraro (ministeria instanco, kiu fakte respondecas pri la instruado) komisiu respondeculon pri la koncerna lingvo.

Dum la venontaj semajnoj ne atendeblas rapida reago de la decidantoj en la ministerio, unue ĉar ili estas okupataj pri la reformo decidita de la ministro Vincent Peillon, due ĉar la 2-an de aprilo 2014 ŝanĝiĝis la ministro (la nova nomiĝas Benoit Hamon). Tamen la delegacio daŭrigos la agadon, kontaktante homojn kaj en la Ĝenerala Inspektoraro, kaj ĉefe en la Supera Konsilio pri Programoj, ekstera konsilanta instanco, parte faka parte politika, kreita en 2013.

lom mallongigite, fonto: www.edukado.net

TATOEBA – granda sukceso de Esperanto

Klakante al <http://www.tatoeba.org/epo> kiu ajn povas konvinkiĝi, ke vere temas pri granda sukceso de la internacia lingvo Esperanto.

TATOEBA komence estis angla-japana, interreta frazokolekto, kiu dum kelkaj jaroj ampleksiĝis. Nun jam troviĝas en ĝi pli ol 3.039.000 frazoj en 168 naciaj- kaj planlingvoj.

Esperanto aperis en TATOEBA jam relative frue. Somere de 2012 ĝi atingis kaj daŭre gardas la duan lokon post la anglalingvaj frazoj. Jam pli ol 324.000 esperantlingvaj frazoj pravas, ke ĉiu homa penso estas tradukebla esperanten. Tiu ĉi fakto signifas grandiozan, ĉiutagan reklamon por Esperanto, ĉar ĉiuhore miloj da ne-esperantistoj el la tuta mondo vizitas la paĝon kaj vidas la esperantan flagegon.

En la paĝokapo, dekstre, supre oni povas aliĝi kaj fariĝi membro de TATOEBA. La membroj rajtas enigi frazojn kaj skribi komentojn al la frazoj de aliuloj. Nur la „posedantoj“ de la unuopaj frazoj rajtas ŝanĝi siajn frazojn. Krome povas interveni - post peto

ŝanĝi ion - nur kelkaj „tekstaraj bontenantoj”. Helpe de tiu kunlaboro la frazoj senĉese pliboniĝas kaj povas aperi pluraj, eventuale pli bonaj tradukoj.

Kadre de TATOEBA oni povas serĉi ekzemplo-frazojn, en kiuj aperas certaj vortoj, aŭ tutajn frazojn. Tiu ĉi plurlingva frazaro estontece ebligos ĉiam pli bonan maŝintradukadon. Kiu ajn povas kontroli sian aktualan lingvoscion komparante sian tradukon kun la tradukoj de aliuloj. Iuj frazoj havas ankaŭ sonregistraĵon, kiuj povas esti tre utilaj por lingvolernantoj.

Jen facila maniero ekkontribui post registriĝo: iru al <http://tatoeba.org/epo/sentences/show> .

Aperas hazarda frazo en hazarde elektita lingvo. Elektu la lingvon, el kiu vi deziras traduki, supre. Klaku al la butono „sekva”. Nun aperas „ĉefa frazo” en la de vi elektita lingvo. La ĉefa frazo estas la supera frazo en pli grandaj kaj dikaj literoj. Sub ĝi kutime aperas rektaj kaj malrektaj tradukoj en diversaj lingvoj. La rektaj tradukoj aperas post verda faldita sago.

Kontrolu, ĉu jam estas bona traduko en Esperanto. Se ne, kaj se vi povos sendi bonan tradukaĵon, klaku sur la dikan verdan sagon super la diklitera („ĉefa”) frazo. Aperas kampo, en kiu vi povas tajpi vian frazon. Vi povas elekti la lingvon, al kiu vi tradukis, sed ĝenerale „Aŭtomata rekono” bone funkcias. Se via frazo estas tute en ordo (inkluzive de interpunkcioj, k.t.p.), klaku al la suba butono „Sendi frazon”. Se vi jam tajpis vian frazon, sed vi deziras unue legi alilingvajn frazojn, klaku al „Nuligi”. Via frazo restos en via komputilo. Ĝi reaperos post klako al la dika verda sago maldekstre super la ĉefa frazo. Vi povas adapti vian frazon.

Ni proponas, ke ĉiu samideano vizitu tiun paĝaron, uzu, utiligu kaj per novaj aŭ tradukitaj frazoj kompletigu ĝin. Precipe la anglaj, usonaj kaj aŭstraliaj por-esperantaj agantoj povus multe helpi per esperantigo de la anglalingvaj frazoj, el inter kiuj multaj estas malfacile kompreneblaj por ne-anglalingvanoj. Ankaŭ la plimultigo de la esperantlingvaj sonregistraĵoj estas dezirinda. Jen bonega laborŝanco por nia diligenta kolegaro!

Leo De Cooman (Belgio) kaj Lajos Molnár (Hungario)

Familio de plurlingvuloj en Vojevodino



El la leteroj

- Kara,

mi ĵhus revenis de Tirana, retrovis mian telefonon kaj volas pardonpeti pro mia ne alveno al la arta ekspozicio. Unue, pluvegis, sed pli gravas ke ni (ĉa. 50 personoj) kunestis ghis la 18:30 en la Bahaa Centro pro la 'Kuvendi Kombetar' kaj la elekto de nova Nacia Spirita Asambleo de 9 personoj, diversaj prelegoj kaj konsultado. Krome mi pensis ke, vidinte ke vi ne estas kotizperanto, mi ghiros mian kotizon che UEA far mia filo en Germanio (mia bankisto!).

Denove mi dankas vin por via invito al tiu interesege kunveno vendrede kun tiom da junaj Albanoj dezirante fari ion utilan por ilia lando! Tio signifas veran socian progreson! Kaj dankon por viaj 2 artikoloj, kiujn mi tuj legos! Samideane kaj kore salutas vin
Martha

- Kara fratamiko
Saluton el plensuna Brazilo!

Nome de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, mi korplene dankas Vin pro aperigo de lia artikolo titolita *Solidareco kaj homaj rajtoj* en via riĉenhava bulteno. Ni, teamanoj de Esperanto-Fako de LBV, dankas Vin per la jena eldiraĵo de la edukanto Paiva Netto:

"Plej granda parolado de homo estas liaj agoj".

Altestime kaj samideane,
Maria Aparecida
www.bonavolo.com

- I nderuar,

(Takimi me ju më nxiti të informohem mbi gjuhën Esperanto, shoqatën tuaj dhe me se mund të kontribuoj. Ende nuk premtoj sepse e kam kohën të kufizuar (ndoshta arrij të shkruaj një artikull përmbledhës mbi rëndësinë e saj). Sa interesante : Kjo gjuhë e thjeshtë e krijuar për t'i ndritur njerëzimit të drejtën universale të lirisë, barazisë e vëllazërimit përkundër dhunës së verbër të grupeve të interesit! Do të nis të mësoj nga pak edhe unë gjuhën Esperanto.)

La renkontiĝo kun vi instigis min informiĝi pri la lingvo Esperanto, via asocio kaj pri la eblecoj de mia kontribuado. Ankoraŭ mi ne promesas ĉar mia tempo estas limigita, eble mi sukcesos verki artikolon resuman pri la ties graveco. Kiom interesa: Ĉi tiu simpla lingvo kreita por prilumigi al la homaro la universalan rajton por libero, egaleco kaj frateco kontraŭ la blinda perforto de la grupoj pri intereso. Ankaŭ mi komencos eklerni la lingvon Esperanto.

<http://www.goethe-verlag.com/book2/SQ/SQEO/SQEO002.HTM>

Adiaŭ

Me respekt

Petro

- Mi estas iom elrevigita. Nu ja, mi havis kontakton kun Sokol kaj ankaŭ partoprenis feston por albanaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj kelkaj aliaj albanoj. Mia agrabla kaj afabla instruistino Julietta kaj ŝia edzo estis invititaj. Ili bone prizorgis min. Shajnas ke Sokol ne shatas esperanton. Li ne diris tion, sed kiam mi skribis kaj konigis ligilon al li pri la artikulo pri vi, li forigis ghin (en facebook). Mi kunportis la libron La hunda Hauto kaj diris, ke estas dank' al esperanto, ke mi ekkomencis lerni la albanan - li montris neniun intereson. Chi tiun monaton li iros al Tirana kun la libroj, kiujn li tradukis al la albana por disdoni ilin al lernejoj

tie. Mi demandis lin, chu mi eble povus kunsendi kelkajn librojn al vi, sed li ne respondis tiun demandon. Do mi pensas, ke li nur volas agi por siaj propraj aferoj. (Se Mimosa denove iros, mi povus sendi kun ŝi.)

Sokol, diris al mi, ke li volas kontaktiĝi kun albanoj en mia urbo. Ĉar mi konas neniujn mi iris al nia biblioteko, kaj felice la bibliotekisto konas almenau unu. Mi skribis lian nomon, adreson kaj telefonnumeron al Sokol. Sed li skribis al mi, ke li ne havas tempon telefoni al la albana viro! Tiu estas lau mi strange!

Sokol certe estas kiel la plej multaj homoj. Li kaj ili ne komprenas la valoron de esperanto.

Danke al la artikolo pri vi kaj esperanto (el albana gazeto) en facebook, mi ofte ricevas novajhojn el tiu gazeto.

Mi pensas ke estas char mi klakis "shati" tie, kaj nun mi estas "shatanto" de tiu gazeto! Estas bone por mi, char

en tiumaniero mi povas plulerni la albanan 😊

Korajn salutojn de
Birgitta

Informaĵoj

ROMAN DOBRZYŃSKI - MARATONANO DE PRELEGOJ

Vendrede la 16an de majo je la 14h00 en la Vroclava Centro de Pliaguloj (Vroclavo/ Malsupra Silezio / Pollando) **kadre de tutjara programo de la Akademio de Pliaguloj** sub komuna titolo: „**Kiel grandioza estas la mondo**” okazis la **renkontiĝo kun fama esperantisto Roman Dobrzyński**.

La ciklon preparas por neesperantistoj la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo (CIE-RBV). La celo de la programo estas stimuli aktivecon de la pliaguloj, vigligi la kunlaboron kun neesperantaj medioj kaj disvastigi Esperanton.

Dum la vendreda renkontiĝo **Roman Dobrzyński montris al la neesperanta publiko sian la plej novan filmon** rakontanta pri lia monata restado en Nepalo „Nepalskie Amplitudy” („Nepalaj Amplitudoj”). La filmo estis premiero speciale preparita por la vroclava publiko. Post la filmo Roman respondis demandojn de la publiko proksimigante multajn interesajn informojn pri la plej vertikala lando en la mondo.

Fine de la renkontiĝo Małgosia Komarnicka enmanigis al Roman Dobrzyński **dankdiplomon de du organizaĵoj**: la Centro de Interkultura Edukado (Esperanta) kaj la Vroclava Centro de Pliaguloj (neesperanta) pro la bela prelego.

Ĉiuj renkontiĝoj kun Roman Dobrzyński estas ĉiam malpacience atendataj de publiko kaj tial Joanna Ryłko, specialistino pri promotado de la Vroclava Centro de Pliaguloj deziris **intervjui** lin. La planita intervjo je 30 minutoj plilongiĝis pro multaj interesaj informoj kaj oni devis ĉesigi ĝin post preskaŭ 100 minutoj, ĉar Romanon jam atendis publiko. La intervjuo, kiu enhavas tre multe da informoj pri Esperanto dank’ al la Vroclava Centro de Pliaguloj atingos ne nur plimulton da vroclavanoj aŭ loĝantoj de Malsupra Silezio, sed pere de interreto ankaŭ aliaj neesperantistoj.

La saman tagon en la sama loko, sed je la 17h00 Roman denove **prelegis**, sed ĉi foje **por junaj homoj**. Pri la renkontiĝo petis Aleksander Pękała, la kanceliero de Medicina Altlernejo en Legnica vidante la afiŝon informanta pri prelego de Roman Dobrzyński. Dum la renkontiĝo, la neesperanta publiko unue pririgardis la saman filmon pri Nepalo kaj poste starigis multajn demandojn kaj tiel ekestis vigla diskuto. Ĝi konsciigis al la juna publiko interalie ankaŭ valorojn de Esperanto. La tempo de la prelego pasis tiel rapide, ke ravitaj pri ĝi junaj neesperantistoj jam interkonsentis sekvan renkontiĝon.

Je la 19h00 Roman Dobrzyński renkontiĝis **kun esperantistoj** en sidejo de Silezia Esperanto Asocio kie li ankaŭ prezentis la saman filmon pri sia vizito en Nepalo kaj interese pri ĝi rakontis. Malgraŭ, ke vendredo ne estas tago de kutimaj klubaj renkontiĝoj venis dekelkaj personoj.

Dum ĉiuj prelegoj Roman Dobrzyński emfazis, ke lia vizito en Nepalo estis unu el malmultaj liaj eksterlandaj vojaĝoj dum kiuj li uzis preskaŭ ekskluzive la lingvon Esperanto. Dank' al gvidado kaj gastigado fare de lokaj, nepalaj esperantistoj li ne estis devigita paroli en iu ajn alia lingvo krom Esperanto.

La Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo jam **invitas al sekva renkontiĝo la 27an de junio** al la Vroclava Centro de Pliiĝuloj **je la 14h00**.

La anonco pri nia ciklo aperos **venontsemajne en la „Vroclava Gazeto”**, kiu atingas grandan nombron da personoj.

Por la estraro de la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo

Małgosia Komarnicka

[Vizitu nian Ipernity-paĝaron kaj rigardu pli da fotoj]

Konkurso de mallongaj filmoj

Teo • Amo

Kiel nia lingvo Esperanto, teo povas roli kiel perilo por amo kaj geedziĝo. Bonvolurakonti per filmetopri teo kaj amo, vi havos ŝancon **senpage vojaĝi al Ĉinio**.

Foje diris Julio Baghy: *“Amo kreas pacon, paco konservas humanecon, kaj humaneco estas la plej alta idealismo.”* Amo estas la kernode nia lingvo Esperanto. Kaj Teo, kiun trinkas ĉiutage du trionoj de la monda loĝantaro, estas la magia trinkaĵo, kiu vekas energion kaj iniciatas la vivmanieron de paco kaj amo. Tion celas ankaŭ nia lingvo Esperanto.

Do, aliĝu! Rakontu pri teo kaj amo per mallongaj filmoj! Ni estas pretaj gastigi vin en Ĉinio!

Celo

Subaŭspicio de UEA, la konkurso lanĉas Ĉina Radio Internacia kaj aliajn esperantistaj sponsoroj, subtenantoj kaj asistantoj, celante:

A) evoluigi la arton de mallonga filmo en la internacia lingvo kaj premi partoprenantojn, kiuj elstariĝis pro sia kontribuo al la arto de mallonga filmo.

B) montri al la publiko, ke Esperanto estas viva, utila, vigla kaj profita....

C) atentigi ne-esperantistajn rondojn, allogi novajn “esperantistojn”, precipe junulojn, interkomuniki asociojn kaj klubojn de Esperanto kun lokaj radioj, televido, ĵurnaloj kaj aliaj ne-esperantistajn rondojn, kaj aktivigi individuojn kaj asociojn de Esperantujo.

D) Provi merkati Esperanton (La konkurso monsubtenas ĉinaj te-entreprenoj, societoj kaj lokaj registaroj) La **Regularo** kaj la **Aliĝilo** troviĝas sube kaj en la jenaj ligiloj:

[esperanto.cri.cn/filme\(esperante\)](http://esperanto.cri.cn/filme(esperante))

[esperanto.cri.cn/filmc\(ĉine\)](http://esperanto.cri.cn/filmc(ĉine))

Regularo

Tagordo	Majo	Junio	Julio	Aŭgusto	Septembr	Oktobro	Novembr
Programo					o		o
/Monato							
Filmo-kolektado							
Aljuĝo de ĵurio							
Interreta Voĉdonado							
Premiado/Filmfestivalo							

Aktivecoj en Gresillon

Chi-somere en kastelo Gresillon, la semajno de turismo au Esperanto-kurso de dimanĉo 29a de junio ĝis dimanĉo 6a de julio 2014

kun tuttagaj ekskursoj al la Luar-kasteloj kaj rezidejoj de Renesancaj artistoj au kun Esperanto-kurso kaj aktivajhoj de kanto kaj danco kun Jean-Luc estos organizita nur se minimume 20 personoj alighas ĝis la 31a de majo.

Atentu do, ne prokrastu vian alighon por tiu escepta sperto de vizitoj gvidataj en Esperanto de nia profesia chicheronino Catherine Kremer.

Informoj gresillon.org/s2

Inscriptions gresillon.org/alighos

.....*Bonvenon*.....

Jannick HUET, Catherine KREMER, Jean-Luc KRISTOS

kastelo@gresillon.org

Artikoloj

Ni ne estas robotoj

- -A
- José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.
-

Je la vespero de la 30-a de januaro 1989, mi babiladis kun gejunula ĉeestantaro pri la valoro de la vivo kaj de la instruoj, kiujn ĝi donacas al ni, kaj tiun pripensadon mi proponas al tiuj, kiuj honoras min per sia legado:

Gejunuloj, aŭskultu la instruadon de la Naturo, la sciigon de plantoj kaj de bestoj, eĉ se ili ŝajnas al vi sensignifaj. Ne senmotive ni uzas ĉirkaŭ niaj konstruaĵoj florojn, arbetojn, arbojn, nome ĉiamajn allogaĵojn transdonatajn de la Ĉiela Patro. Lasu, ke ravu vin la flugado de birdoj kaj la sonado de cikadoj, la vento, kiu traboras sian vojon inter folioj kaj la ekzotika melodio de grilo ĉe sunsubiro. Ne preterpasu kun indiferento preter tiom da belaĵoj. Vi ja ne estas robotoj! Ĉi tio plifortigos vian homecon. Naturo senĉese kantadas al viaj koroj. El kie venas animforto? Ankaŭ el la observado de ĉio tio, kun fleksitaj genuoj... ĉar tio estas vivo, Dio, Jesuo, la Sankta Spirito kaj la Naturo mem.

Degelado ĉe la Arkta Kontinento

Pli ol iam ajn, amo al la vivo nuntempe estas valorigo kaj defendado de la Patrino Naturo, kies esenca parto ni estas. La malo de tio kaŭzas konsekvencojn, kiel tiun registritan de Andrew C. Revkin, el la ĵurnalo The New York Times, je la 21a de septembro 2007:

"Polusaj krustoj en la Arkta Oceano, kiuj malgrandiĝas pro somera varmo, ĉi-jare retroiĝis je pli ol 1 miliono da kvadrataj mejloj (ĉirkaŭ 2,5 milionoj da kvadrataj kilometroj) – kio ekvivalentas al sesoble pli granda areo ol la ŝtato Kalifornio – sub la minimuma mezuma areo dum la lastaj jardekoj, raportis sciencistoj lastan jaŭdon (20/09).

"(...) Tiujn ciferojn prezentis Nacia Centro de Mezurado pri Glacio kaj Neĝo ĉe Blouder, Koloradio/Usono, publikigitajn ĉe la retpaĝaro nsidc.org.

"(...) Mark Serreze, veterana esploristo ĉe tiu centro pri glacio kaj neĝo diris, ke pli kaj pli klare montriĝas, ke la klimataj ŝanĝoj kaŭzataj de akumuliĝo de gasoj je forceja efiko kaŭzas arktan varmigadon, kion oni vidas ne nur pro la flosado de glacio, sed ankaŭ pro la degelado de surteraj glaciejoj, de tundro kaj pro la varmiĝado de marakvo (...)"

Kio ankoraŭ devos okazi, por ke la tuta mondo vekiĝu antaŭ la tuja danĝero nin minacanta? Kaj ekzistas tiuj, kiuj neas la realaĵon de Apokalipso kaj la valoron de la granda suferado antaŭdirita de Jesuo. Tio estas: se oni legas tion...

Sed danke al la natura obstino pri postvivado, kiu karakterizas la homan specion, iniciatoj ekaperas, por plibonigo de la mondo, je konsiderinda kvanto.

Kiel ĉiam, ni kriadas: detruado de la Naturo estas ekstermado de la Homaro.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalista, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).



- José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

Kvankam la nuntempa realaĵo montras al ni panoramon de hejma perforto; de pli kaj pli granda kvanto da junuloj, kiuj drogaĉumas; de eltrovo de sekso fare de infanoj, kiuj transsaltas gravajn etapojn en psika formiĝo; surprize, rilate al tiaj malĝojigaj faktoj, esploroj montras ankaŭ, ke eĉ "plej modernemaj" homoj, en momentoj de krizo, serĉas apogon hejme de panjo aŭ de avinjo...

Mi respektas la opinion de tiuj, kiuj prognozas kiel nepre okazontan faktan la malaperon de familio. Tamen, mi dubas pri ilia rezono, kiam ili asertas, ke ĝia valoro por plifortigo de la socio atingis sian finon. Nu, socio ne ekzistas sen familio. Kaj neniu ŝanĝo sur la Tero okazis pace.

En la 9-a Kongreso de la Legia Junularo de LBV, en la jaro 1984, mi diris, ke en mondo konstante minacata de sovaĝo, konvenas rememori, ke post falo de baroj spacaj kaj tempaj, ju pli oni anoncas ĝian finon, des pli la familio kreskas kaj nomiĝas Homaro. En la jarcento de hidrogenbombo, ni ne estas tute savitaj de io ajn, eĉ se ĝi okazas aliflanke de la mondo...

Dum periodo de profundaj ŝanĝoj, ĉiuj bezonas helpon. Solemuloj ne plu havos ŝancon, malgraŭ la tutmondigo kaj malgraŭ multaj kontraŭdiraj analizoj farataj pri ĝi. Ne nur jarfinaj antaŭvidantoj eraras... Ankaŭ analizistoj de sociaj faktoj, politikistoj kaj ekonomikistoj. Kreskanta manko de prudento en la mondo devigos la homon, sub prema bezono, refari la familion, la universalan familion, la Homaron, eĉ se restos iuj devojiĝintaj ŝafoj...

Kaj la familio? Ĝi postvivos!

Ĉu la familio estingiĝas? Ne. Ĝi evoluas, nature. Kaj meze de tiu tuta konfuzo okaze de transiro de jarmiloj, eĉ se tio ŝajnas nekredibla al tro supraĵaj observantoj, tamen ĝi konfuzo kaj heziteme serĉas Ion, kaj iam ĝi konstato, ke ĝi estas Dio — kun nomo aŭ sen nomo —, ĝi estas Amo, sen kiu homoj ne povas postvivi digne, ĉar vole-nevole ili apartenas al Dio. Apostolo Paŭlo skribis en la Dua Epistolo al Korintanoj, 6:16: "... ni estas la Templo de Dio Vivanta".

Sen bato sur la kranion

Kaj mi plu diris: Nenio postvivas sen Amo. Iam estonte ni alvenos al tiu kompreno. Ŝanĝo de kutimoj estas procedo pli malnova ol tio, kion homoj pensas... Ĉi tio kaŭzas surprizon pro la pli granda rapideco nuntempa, kaj amaskomunikiloj plene agadas. Vidu, kiel antikva estas

tiu procedo: kiam unu primitiva homo iam decidis, ke li ne plu batos la kranion por submeti la elektitan inon, certe iuj aliaj tiutempe ektimis "tian absurdaĵon": *"Jen tio estas tre danĝera, kie estas la respekto? Tiel la familio destiniĝos al bedaŭrinda fino"*.

Sed tio ne okazis... Okazis evoluo. Nu, virino ne estas ia ĉasaĵo. Familio finiĝus nur, se ne plu estus Amo. Kaj ĉi tiu neniam estingiĝos, ĉar ĝi reprezentas por la spirito la samon, kiel oksigeno por la korpo.

La konsidero de Fernanda

Al mi plaĉas citi la ekzemplon de la granda, brazila aktorino Fernanda Montenegro, kiam en TV-programo oni demandis ŝin: *"Ĉu vi opinias, ke la teatro estingiĝas?"* Ŝi elegante respondis: *"Teatro similas al familio; de mia infana aĝo mi aŭdadas, ke ĝi estingiĝos, sed ĝi jen plu vivas"*.

Tute pravas la kara Fernanda: familio evoluas, sed neniam mortos. Amo, kiam aŭtentika, ĉiam venkas! Eble tio postulas tempon, sed ĝi ĉiam triumfas, ĉar ni vivas multajn vivojn, kiuj komplementiĝas ĝis nia kompleta integriĝo en Dio, kiu estas — ni insistas — precize Amo (Unua Epistolo de Johano, 4:8). En tempo de tiom da amareco, estas esence grave, ke oni kredu Lin. En momentoj de intensaj reformoj, ĝenerale oni misagas per troigoj. Tiam Amo estas nemalhavebla. Okaze de tro seka vetero ni petegas pluvon.

Nu, perforto atingis absurdajn nivelojn. Sed venos tempo de ekvilibro. Ĉia troigo lacigas, naŭzas kaj forĵetiĝas. Ju pli forte oni streĉas kaŭĉukan fadenon, des pli forte ĝi revenas laŭ la grado de la streĉiĝo. Kaj eventuale ĝi atingas la vizaĝon de tiu, kiu streĉis ĝin. Tio estas instruo de Fiziko. La Tria Leĝo de Newton, kiu ankoraŭ plene validas.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de *International Federation of Journalists* (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵaneiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).



Turistvojaĝo al Bona Espero

Martin Hügström

La bieno-lernejon "Bona Espero" en Brazilo mi vizitis ĉi-vintre. Ĝi situas en altebenaĵo 230 km norde de la ĉefurbo Brasília. La vojaĝo estis organizita de Esperantotur en Bydgoszcz kaj daŭris unu monaton ekde meza decembro. Mi partoprenis malgrandan grupon de ses personoj, kiun gvidis la UEA-estrarino Barbara Pietrzak. Krom Bona Espero ni ankaŭ vizitis la urbegojn Brasília kaj Rio de Janeiro.

Esperantistoj ĉe gastdomo en Bona Espero

Bona Espero estis fondita en 1957 de brazilaj esperantistoj kiel sociala institucio por infanoj, kaj ekde 1974 la paro Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia estis ĉefaj prizorgantoj. Ili evoluis Bonan Esperon al moderna lernejo-internulejo, kie multaj infanoj el malbonaj kondiĉoj inkluzive orfoj ricevis edukadon en familia rondo. Sed tiu unikaĵo en la Esperanto-mondo nun estas en fazo de ŝanĝiĝo. La bezono de tiu tipo da institucio ne estas tiom granda kiel antaŭe pro la evoluo de la brazila socio, kaj ĉi-vintre loĝis tie nur tri infanoj. Brazilaj esperantistoj nun diskutas restrukturigon de Bona Espero por evolui ĝin al vera Esperanta Kultur-Centro.

Vidaĵo el Bona Espero trans la savano al Morro Baleia (Monto Baleno)

Nia vizito en Bona Espero estis ero de tiu evoluo. Antaŭe multaj eksterlandanoj vizitis kiel laborantaj volontuloj, sed ni estis la unua vera turist-grupo. Ni ĝuis tri-semajnan restadon en tre afabla etoso. Multaj brazilanoj, interalie kelkaj antaŭe tie loĝintaj infanoj, vizitis la bienon dum la kristnaska kaj novjara festoj. Ankaŭ la antaŭa pola televida ĵurnalisto Roman Dobrzyński estis en Bona Espero. Li multfoje vizitis kaj konatigis Bonan Esperon per televidprogramoj kaj libro. Por ni li estis sperta gvidisto kaj instruisto.

Situanta en la brazila savano je alteco de ĉirkaŭ 1200 m la klimato estas milda. Dum nia norda vintro tie estas pluvsezono, kio signifas ke la savano iĝas verda kun multaj floroj kaj birdoj. Ne pluvas la tutan tempon kaj la suno ofte kaj forte brilas. En la ĝardeno maturiĝas mangoj kaj bananoj sed troviĝas ankaŭ aliaj fruktoj. Bona fonto donas puran akvon, kaj preskaŭ ĉiu-tage mi naĝis en la akvorezervujo aŭ en proksimaj riveroj. Bona Espero havas propran akvofalon je piedira distanco, kaj en la regiono situas nacia parko kun multaj akvofaloj kaj aliaj vidindaĵoj.

Akvofalo en Rio Mulungú sur la tereno de Bona Espero

En Bona Espero troviĝas riĉa kolekto de la Esperanta literaturo. Kiam pluvis mi legis el tiu kolekto, kaj vespere ni ofte rigardis filmojn kun komentarioj en la lingvo internacia. Speciala memorindaĵo estis kiam

brazila paro, kiuj intencas komenci novan vivon en Bona Espero, invitis nin al ilia nupto en tao-inspirita templo najbara.

Mi esperas ke estos sukcesa la transformiĝo al Kultur-Centro, kie esperantistoj el diversaj mondopartoj povos veni. Mi ja tre ĝuis la restadon en Bona Espero, kaj esperas ke ankaŭ aliaj havos tiun eblecon. La vojaĝo finiĝis per kelktagaj vizitoj en Brasilia kaj en Rio de Janeiro gvidataj de spertaj lokaj esperantistoj.

Flordekorita Zamenhof ĉe Bona Espero

Kara Martin

Estas por mi agrable legi Vian mesaghon kaj rememori la unuan Esperanto-turistan ekskurson al Bona Espero. Mi admiris Vian "carpe diem", t.e. Vian kapablon ĝhvi tiun chi unikan eventon.

Mi post la reveno el Bona Espero baldau forveturis al Nepalo por partopreni la "specialan ekskurson" organizitan de Nepala E-Asocio. Partoprenis ĝhin 17 europanoj kaj unu pakistana familio, krome akompanis nin grupo de nepalanoj, centprocentaj samideanoj, entuziasmuloj pri Esperanto kaj nature gastamaj homoj. Jes, la gastamo estas grava principo de la chefreligioj de Nepalo, nome hinduismo kaj budhismo. Estis por mi kortushe observi kiel amike kaj paceme kunekzistas ambau religioj. Dum mia tutmonata estado mi renkontis ech ne unufoje malkontentan vizaghon, malican grimacon au krian parolon. Male - estas daure observeblaj amikaj ridetoj. Imagu ke chio chi okazas en la lando malricha. Chu pro tio la homoj shajnas felichaj?

La nepala E-movado rememorigas la similan staton de europaj esperantistoj antau kelkdeko da jaroj. Shajnas, ke ni estis same entuziasmaj. Bedaurinde Europo estis tiam dividita per la fera kurteno. Malgrau tio esperantistoj helpis unu la alian. Nun tian helpon bezonas la nepalaj samideanoj. Ili ne kutimas peti, sed agas. (Tio nomighas "karma" kaj estas unu el la principoj de hinduismo.) Do, la NEspA organizas fine de februaro alian ekskurson. Ghi situos proksime al Annapurna-cheno de Himalajoj. Tiutempe ne plu estas frosto. En marto ni ĝhuis varman veteron. La valo de Katmanduo situas sur la sama alteco kiel Bona Espero. Kun pezuro mi legis pozitivajn novajhojn el Bona Espero. Ni havis okazon observi la proceson de restrukturigho. Montrighas, ke ghi ebligas malsame, sed ankau sukcese daurigi la pluan ekzistadon de tiu chi Esperanta institucio, unika en la mondo.

Okaze de la Paska festo mi deziras al Vi bonan sanon, kiun Vi ja kapablas bone uzi por bonaj aferoj. La samaj vortoj estas direktitaj al aliaj miaj amikoj, kiuj hazarde legos tiun chi mesaghon.

Amike

Roman Dobrzyński

Genocido dum du jarcentoj

„ Ne ekzistas alia nacio, kiu estis tiel senkompate mistraktite, far la najbaraj ŝtatoj"


(Lordo Bajron pri albanoj)



Bardhyl kaj Fatbardha dum konferenco

I – Bombardadoj de NATO-o sur Kosovon kaj Serbion

Je 24-an de marto 1999 la plej potenca militista organizaĵo, NATO-o (Organizaĵo de Nordatlantika Traktato) lanĉis la aeratakon al la fortoj kaj militistaj objektoj serbaj. Por ke movigu tiun internacian organizaĵon de 28 europaj ŝtatoj, en kies vicoj estis ankaŭ historiaj subtenantoj de Serbio, kompreneble devus esti grave piedpremitaj ĉiuj normoj de interrilatoj internaciaj kaj homrajtoj. Envere en la Eŭropa kontinento estis okazanta la plej kriminala genocido konata dum XX jarcento. Tiu bruo de la NATO-a aviadiloj, ĉe albanoj vekigis la sentojn travivitaj de la eŭropaj civitanoj antaŭ 54 jaroj, kiam komenciĝis la militista atako kontraŭ la faŝisman Aliancon kiu estis nuliginta la sencon de la nomo HOMO.



Aviadiloj de NATO

Unuafoje Serbio, pro kriminalaj agoj kontraŭ la albanan popolon, puniĝis militiste de la Grandpotencoj. Preter tiu internacia apogo de la memdefenda milito de albanoj, Miloŝeviĉ estis devigita kapitulaci kaj akcepti "de facto" la perdon de Kosovo.

La bombardadoj de NATO-o finiĝis je 10-an de junio 1999, per la subskribo de la Interkonsento de Kumanovo, aprobo de la Rezolucio 1244 de la Sekurec- Konsilio de UNO (11/06/1999), retiriĝo de la militistaj serbaj fortoj disde Kosovo kaj venigo de 36 mil internaciaj paggardistoj.



NATO-a trupoj en Kosovo

Sed neniam okazis en la monda historio ke ŝtato, plenuminta ĉiujn krimojn antaŭviditajn de la Internaciaj Konventoj, sin senti viktimon.

Ankoraŭ hodiaŭ, en la lernolibroj serbaj, oni prezentas ĝin kiel nacion-viktimon pro la ĉirkaŭantaj popoloj, nutrigante la junularon per malamo aparte kontraŭ albanoj. En la serbaj lernolibroj oni legas: *"La krizon en Kosovo venigis la agoj de la teroristaj grupoj de albanoj (UÇK- Naciliberiga Armeo de Kosovo), la ribeliĝo kaj la konflikto kun la fortoj de la ordo (polico kaj armeo de Serbio),...ke post la eniro de la NATO-a fortoj estas translokiĝintaj 200 mil serboj kaj mortigitaj kelkaj aliaj centoj.* (Historio de la oka klaso, paĝo 192) (1)

Ankaŭ serbaj politikistoj kaj historiistoj kiel Miloša Knezevik (Miloša Kneževića), en la libro "Forpreno de Kosovo" (Otmica Kosova) neas la genocidon, konsiderante la intervenon de NATO-o kvazaŭ *"instigitan de Usono, (kiu) en la jaro 1999 plenumis militistan agreson kontraŭ Serbion kaj Montenegron. Sekve,..ni (t.e. Serbio)- daŭrigas la aŭtoro- ne akceptos la forprenon de Kosovo"* (ĉapitro 7, paĝo 187- 204) (2)

La neado de la rasisma genocido, misprezentante la historiajn faktojn, flanke de serba ŝtato kaj kvalifiko de la interveno de NATO-o kiel "grandan nejustecon", eĉ "agreson" -laŭ la jura leĝaro de EU, konsistigas krimon. (La Konvento de Strasburgo 28.01.2003, artikolo 6- La neado, minimo aŭ pravigo de genocido kaj krimoj kontraŭ la homaron). (3)

II – Serbio kaj albanoj, dujarcenta problemo

Post disfalo de la Otomana Imperio, albanoj, plej praaj kaj militemaj balkanioj, fariĝis perdintojn.

Ami Bue, botanisto, geografo kaj geologo franca, komence de XIX jc, dum la jaroj 1836-37, entreprenis vojaĝon tra Balkanio. En la jaro 1840, lia studo pri la popoloj de Balkanio, en kvar volumoj, estis aprecita de akademiano Aleksander Belić kiel "vera enciklopedio, nekomparebla, pro precizeco, al iu ajn alia simila eldonaĵo".

Laŭ Ami Bue, Serbio dum la unua duono de XIX jc, enhavis malpli ol 900 mil loĝantoj, dum Albanio 1 miliono kaj 600 mil loĝantoj. En siaj analizoj, *Albanio, pure etna, ampleksis spacon el 180 mil kvadrataj kilometroj. En la duoninsulo estis pli da albanoj ol grekoj kaj almenaŭ dufoje pli ol serboj.* (4)



Granda eksodo de albanoj dum XIX jc

Ankaŭ post la Kongreso de Berlino (1878), la albanaj teritorioj estis pli grandaj ol tiuj de la ŝtatoj, fonditaj antaŭe- dum la XIX jc- Serbio, Montenegro, Grekio.

Nr.	Lando	Surfaco	Loĝantaro
1	Albanaj teritorioj	75.000 km ²	1.700.000
2	Serbio	54.800 km ²	1.600.000
3	Grekio	51.300 km ²	1.400.000
4	Montenegro	8400 km ²	190.000


(5)

Komence de XIX jc, kiam la tuta atento de la eŭropaj reĝlandoj estis fokusita en la "liberaj" spacoj de postotomana Imperio, la tiutempaj analistoj skribis pri la graveco de la albana faktoro.

En la ĵurnalo "Die Völker des Orients-Die Albanesen", Feuilleton der „Debatte“, 27-an de marto 1869, Nr. 86. Jaro VI, paĝo 1), eldonita danke al la sponsorizo de la fama asocio "Lloyd", oni skribis:

"En la konteksto de la "Orienta Afero", ili (la albanoj) akiras pli grandan gravecon ol montenegranoj kaj bosnianoj kune kaj, fronte de la malamiko estas pli respektataj ol grekoj, ne nur tiuj el la internaj regionoj, sed ankaŭ tiuj etendataj ĉe marbordo (...). Ili ne nur troviĝas grandnombre kaj disvastigitaj geografie, sed prezentas potencon popolon kun radikoj kaj formas unu el la faktoroj plej grava en la lasta ludota dramo atendata." (...) Ne estos grekoj tiuj, kiuj akiros hegemonion en Sudo, sed albanoj, ne nur en Makedonio kaj Tesalio, sed ankaŭ en mem Grekio, fariĝos mastroj kaj ĉifoj akiros per plej facila maniero ebla, ĉar en nordo de la lando, ili fakte estas plimulto" (6)

La tempo atestis pro la vereco de ĉi tiu antaŭvido. La fondiĝo de la unua sendependa lando (Helado-Grekio) estis fakte kroniĝo de la milito de albanoj.



Albanoj militas favore al Grekio

Dum la tempo kiam la Otomana Imperio estis forirante kaj la balkanioj projektis iliajn estontajn ŝtatojn, en la eŭropa Okcidento oni esploris pri la eblecoj de la monda regado. Gravan rolon ludis tiudirekte la brita politikisto Halford John Mackinder (1861-1947), unu el la fondintoj de la aktiva geopolitiko.

H. Mackinder, interalie, substrekis la gravecon de la posedado de la maro tra la surteraj marbordaj spacoj, ripetante tiel la esprimadon de la elstara angla nagiganto, Sir Walter Raleigh: *"Kiu posedas la maron, tiu posedas la mondan komercon; kiu posedas la komercon, posedas la mondan riĉecon, do mem la mondon"* (7)

Laŭ tiu ĉi strategio, kompilata far la Grandpotencoj, la Balkana duoninsulo okupis centran lokon inter la eventoj de XIX jc kaj komenciĝo de XX jc. Balkanio estis la ĉefa enirpordo de Okcidento al Oriento

kaj elirpordo al Mediteraneo por Rusio. Ĉi lasta, koncentris tutan ĝian militistan, politikan kaj diplomatan agadojn por la "Orienta Afero" kaj precipe en Balkanio.. Ĝia reprezentanto, Benckendorff (Alexander Kostandinovich Benkendorff, 1849- 1917) demandis la oferon de albanoj, je la nomo de la "rajto de teritoria rekompenco" de la balkanaj aliancoj (Serbio, Grekio, Bulgario kaj Montenegro), kiel venkintajn ŝtatojn en la milito por forpeli Turkion.

Rusio kaj la grandpotencoj kaŝis la historian fakton ke en Balkanio estis albanoj militintaj senĉese dum la tuta tempo de la regado de Otomana Imperio kaj estis fondintaj sukcese la unuan liberan ŝtaton, en la jaro 1821, sude de la Otomana Eŭropo. Sed, kiel skribis la ĵurnalo "Die Völker des Orients-Die Albanesen", Feuilleton der „Debatte“, 27-an de marto 1869, Nr. 86. Jaro VI, Paĝo 1):

"La Orienta Afero" estas alproksimiĝanta al la solvo per perforta tendenco; oni tute ne povas paroli pri paca solvo...(niaj diplomatoj), kaŭrante sur la pulvobarelo minacanta eksplodi momente, prikantas la himnojn de la paco kaj ... konsoliĝas per praa frazo:

"Après nous, le déluge" (Post ni, okazu la apokalipso)".(8)

Antaŭ la kunveno de la Kongreso de Berlino (1878) kaj la ties decidoj, albanoj travivis tri perfortajn translokiĝojn en la Nordorienta Albanio. La unua amasa translokiĝo komenciĝis en la jaroj 1830, aparte en la jaro 1844, danke al pereigaj programoj, persekvante kaj forpelante albanojn disde Belgrado, Niŝ, Granda Plana, regiono de Toplice, Surdulice, Maĉkatice, alivorte, de Sandĵako¹ de Niŝ al la aktuala Kosovo. (9)

En la jaro 1878, la serba ŝtato, per sangumaj akcioj, translokigis loĝantaron de pli ol 780 albanaj vilaĝoj, de Sandĵako de Niŝ, Leskovc, Kurshumli kaj Jablanice. Tiuj ĉi translokiĝoj estiĝis per sovaĝa teroro kaj perdo de multaj homvivoj, ampleksante ankaŭ infanojn en la patrinaj ventroj.

Dum la ruso-turka milito (1876-1878). la organizitaj serbaj fortoj komencis la pereigon de albanoj en la distriktoj de la suda, okcidenta kaj orienta Morava. Laŭ la samtempuloj, oni nombris 35 mil albanajn viktimojn je ĉiu aĝo kaj sekso. La konsulo de la Otomana Imperio en Niŝ sciigis ke el kvartalo en Niŝ, el 300 albanaj domoj, saviĝis nur 20. La ceteraj terebeniĝis. En la kazao² de Leskovc detruigis 1228 domoj en 88 vilaĝoj kaj translokiĝis ĉirkaŭ 20667 homoj; en la distrikto de Perkupo, en 73 vilaĝoj kun 1771 domoj, la plimulto forbruliĝis aŭ detruigis... (10)

Tiu ĉi amasa genocido impetis aparte post la decido de la Grandpotencoj pri la dispecigo de la albanaj teroj. La ĵurnalo "Populli" (La Popolo), februare 25, 1919, skribis:

"Laŭ la precizaj novaĵoj, alvenintaj hieraŭ en Shkoder, la serbaj kaj montenegraj banditoj, post sanguma batalo dum kvin tagoj senĉese kun la albana popolo tiea, estas okupinta perforte

1 administracia unuo

2 Administracia unuo

Plavo-n kaj Gusinjo-n, kaŭzante brulaĵojn kaj grandajn domaĝojn per kanonoj, krom la homojn mortigitajn dum la batalo. La vilaĝo Vuthaj el 200 domoj, estas preskaŭ ruinigita pro la kanona fajro. Oni atendas forpelitajn tufojn en Shkoder."

La sama ĵurnalo je 28-an de februaro 1919:

"La tagon antaŭ hieraŭ, komenciĝis la unua forpelint-alveno verŝajne en Shkoder, de ĉi tiu malbonŝanca popolo de Plavo kaj Gusinjo, ege ĉagrenita kaj la homvico ankoraŭ ne finiĝis.

Inter tiuj ĉi forpelintoj en sia lando estis ankaŭ homoj el Rugova, ĉar ankaŭ en ĉi tiu distrikto la sudslavoj estas forbruliginta kaj ruiniginta...Ĉi tiu albana popolo devigita elmigri, atingas la nombron de dekkvin mil, sed parto el ili estas direktita al la Montaro de Gjakova. La nombro de tiuj mortigitaj ankoraŭ estas ne sciita, ĉar ĉio evoluis tre rapide" (11)

La kanzono de Asllan Krasniqi, turmentita de la otomanaj okupantoj kaj novaj serbaj kaj bulgaraj okupantoj, estas ankoraŭ kantata en la "kvartalo de la enmigrintoj" en Prishtina. La kanzonon oni rekomendis al la kantisto Demir Krasniqi, por ke li savu ĝin kaj kantu en ĉiuj albanaj teroj.



Albanaj batalantoj kontraŭ otomanojn

Ho, famon faras, tiu Serbio,

Ho, forpelas perforte per soldataro,

Ho, mortigas homojn familie,

Ho, malbone finiĝis la albanaro!

Ho, forbuĉas infanojn, fortranĉas maljunulojn,


Ho, kiu scias, kion ĝi ne faris ankoraŭ ĉiam malbone!

*Ho, fortranĉas virojn, fortranĉas virinojn,
Ho, tian teruraĵon neniu jam faris ĝis nun!*

*Ho, kion faras tiu Serbio,
Ho, en la mondo neniu faris pli malbone!
Ho, en la mondo neniu vidis similaĵon,
Ho, la bebojn en la patrinaj ventroj ĝi estas eksplodinta!
Ho, el la patrinaj ventroj la bebojn kelksemajnajn estas eliginta!*

*Ho, nur Serbio faras ĉi tiun teruraĵon!
Ho, vivaj albanojn ĝi ne plu volas lasi!.. (12)*

La genocido malaperiginta centojn da albanaj vilaĝoj kune kun la ties loĝantoj, ne nur en nordoriento, far la slavoj, sed ankaŭ sude, far la helena ŝtato, ne preterpasis la okcidentajn kanceleriojn. Sed tiu sangumado kaj etna purigado, nenian gravecon prezentis por la kolonialistaj ŝtatoj de Eŭropo, ĉar la genocido kontraŭ la popolojn, tiutempe, ne konsideriĝis krimo, sed legitima rajto de ĉiu okupanto.



Ĉamerio

Maltrankvilo por ili estis la etendiĝo de la terspacoj de slavoj, apogitaj de Rusio kaj ties kunfrontiĝo al la intereso de grandpotencoj en Balkanio. Oni konsideris necesa ke preter la forto, oni ekuzu ankaŭ novajn formojn en la internaciaj rilatoj.

La brito H. Mackinder, samkiel multaj analistoj de la fino de 19-a jc, sin esprimis pri la politiko de "ekvilibro" inter la Grandpotencoj. (13)

Tiu ĉi "ekvilibro" (konvertita pli poste en la termino "paco") inter la Grandpotencoj, ekaplikiĝis en la politika kaj militista agado eŭropa, antaŭ kaj post la militoj, ankaŭ en la postaj jarcentoj.

Je 12-an de aŭgusto 1913 en la Ĉambro de Komunoj, la ministro pri la eksteraj aferoj de Grandbritio, Sir Edward Grey, postkiam dispeciĝis la albanaj teroj, konfesis:

"Mi estas konvinkita ke , kiam oni ekscios ĉion, tiu ĉi decido estos ktitikata juste de multaj flankoj (...) sed ni devas prikonsideri, ke en la konversacioj rilate la limojn de Albanio, la ĉefa celo estis por ne kaŭzu konflikton inter la Grandpotencoj. Tial, se la interkonsento pri Albanio estiĝis jam, savante la harmonion inter la Grandpotencoj, ni povas diri ke tio estis plena sukceso por la viva intereso de la paco en Eŭropo!"

En siaj memoraĵoj, la fondinto de la albana ŝtato de 1912, Ismail Qemali, sin esprimas ironie:

"ni estis konsolitaj, aŭdinte ke ni devus oferiĝi pro la ĝeneralaj interesoj de Eŭropo..."

El 180 mil kvadrataj kilometroj kun ĉirkaŭ 2 miliono da albanaj loĝantoj, la albanaj teroj, je la fino de XIX jc restis nur 80 mil kvadrataj kilometroj.

En la Konferenco de Ambasadoroj (decembre 1912- aŭguste 1913) la rusa kaj la franca diplomatioj sukcesis deŝiri de Albanio la plej riĉajn regionojn. La Grandpotencoj eŭropaj aprobis la balkanan mapon kie Serbio, strebinta turniĝi en balkanan potencon, kvankam disponis nur 900 mil loĝantoj, denove grandiĝis je 39 mil kvadrataj kilometroj, forpreninte de Albanio 1290 000 loĝantojn, aŭ 55 % de la ties popolo. Montenegro grandiĝis je 7 mil kvadrataj kilometroj kaj prenis 260 000 loĝantojn, duobligante tiel sian loĝantaron. Grekio grandiĝis je 51300 kvadrataj kilometroj prenante ankaŭ 1624 000 loĝantoj. (14)



Konferenco de Londono 1913

Post multaj klopodoj por malaperigi, disde la Eŭropa mapo, Albanion, al ĝi oni lasis 28 747 kvadratajn kilometrojn, konsistigantaj hodiaŭ la spacon de la Respubliko de Albanio. Tiu forrabo far la slavo-helenaj ŝtatoj, estis realigita piedpremanante sur la kadavroj de la aŭtoktonaj albanaj loĝantoj.

"Je 25-an de februaro 1914, en Kuqar de Permet, la greka armeo forbuĉis ĉiujn infanojn dum la virojn enfermis en la preĝejo de Kosina, kie ĝi mortigis ilin barbarece...(iliaj ostoj antaŭ, kelkaj jaroj, estis miskonsideritaj kvazaŭ apartenis al la grekaj soldatoj, falintaj dum la itala-

greka milito, 1940). En la vilaĝo Peshtan, la beboj ululadis serĉante siajn gepatrojn. La soldatoj arigis ilin kaj forkondukis en domon, kie estis puto. Poste la soldatoj prenis ilin laŭvice, forhakis la kapojn kaj enĵetis en la puton. Intertempe, la virinoj, post kiam oni seksperfortis ilin, estis mortigitaj per bajonetoj...(15)




Genocido de grekoj kontraŭ albanojn de Ĉamerio, junio 1944

Je la nomo de la albana flanko, la usonano C.T. Erikson, en la jaro 1919, antaŭ la Komitato pri la Interrilatoj kun Ekstero de Usono, substrekis:

"La civilizita mondo devas pardonpeti pro la amasaj pereoj de la albanaj vilaĝoj, sojle de la Unua Mondmilito...Tio sekviĝis per terura propagando, kiu favoris la diskriminacion de la albana popolo, instigante malamon..." (16)

La albana etnio, sojle de la detruo de la putriĝinta Otomana Imperio, perdis tutajn regionojn el plej fekundaj kaj strategiaj, kiel Areo de Tivar, Hot, Gruda, Pazar i Ri (Novipazar), Sanxhak, Nish, Ĉarkaŭaĵoj de Manastir (Bitolje), distriktoj de Janina kaj Ĉamerio, kiuj malpopuliĝis aŭ asimiliĝis perforte de la novaj posedantoj. Per ĉi tiu dispecigo de la albanaj teroj far Grandpotencoj, ekis la plej granda sovaĝa slavo-helena genocido kontraŭ la plej malnovan popolon de Balkanio kaj Eŭropo.



La urbo de Nish XIX jc

Atestanto pri la krimoj de serboj dum la jaroj 1912-1913, estis ankaŭ eta knabino je nomo Gonxhe Bojaxhi, kiun la mondo konas hodiaŭ per la nomo de Patrino Tereza. La serbaj krimuloj venenigis ŝian patron kaj ŝia familio saviĝis nur forfuĝinte je direkto de Tirana.

"La eŭropa paco" kun la tuta "ekvilibro" por kontentigi la apetiton de la Grandpotencoj kaj de ties satelitoj, ene de tempa arko je 32 jaroj (1913-1945), enkondukis la ampleksiĝon de Balkanio en du balkanaj kaj du mondaj militoj.

III- La genocido kaj rasismo balkana kontraŭ la albanan etnon

Estas kelkaj ideologioj kiuj nomumis historiajn periodojn: " la rasismo kontraŭ hebreojn" estas nomuminta la Duan Mondmiliton. Ĉi tiu rasismo, dediĉita al la agado de la nazia ŝtato de Hitler, fakte estis nur apliko de la ellaborita ideologio pri kvazaŭsciencaj tezoj de multaj intelektuloj, esploristoj de la natursciencoj, analistoj de la politiko kaj de moderna socio de XIX-XX jc el diversaj landoj okcidentaj eŭropaj (Herbert Spencer, la libro "La milito de la rasoj", de Ludwig Gumplowicz, Francis Galton kaj Ernst Haeckel, Halford J. Mackinder ka).

La franca etnologo Georges Montandon³, novembre 1940, publikigis la libron "Kiamaniere ni rekonu la hebreon?" (Comment reconnaître le Juif ?), kiu servis kiel scienca bazon de la propagando kontraŭsemita hitlera. Tiu intelektula agado, kiu apenaŭ nigrigis la facon de la ties aŭtoroj (kiel tio okazis en la kazo de Hitler) servis kiel bazon por la politikoj de la eŭropaj landoj kaj pli vaste.



³ Georges Montandon estas sviso je fora deveno franca. Kvankam li estas plej fama persono el sia vilaĝo, ĉi lasta ne mencias lin pro honto. Tamen ĝis la lasta kvarono de lia vivo Montandon estis ia eminentulo, gravulo internaciskale, sed ĉion li rompita fine. Francio senigis lin de ŝtataneco donita en la jaro 1936. Aŭguste 1944 la batalantoj de la rezistado mortigis lian edzinon kaj li restis vundita. Mortis pro tiuj vundoj sed ankaŭ pro kancero ene de aŭgusto 1944. Kelkaj konsideras lin svison, kelkaj sviso-francan sed neniu francan. Li studis en Genevo kaj Curiho kaj tutan aktivecon tra la mondo li faris kiel svison antaŭ ol morti en Francio.

Pri la genocido kontraŭ hebreojn, oni estas parolintaj kaj parolas ankoraŭ hodiaŭ. Estas turniĝintaj al muzeoj la pereigaj koncentrejoj por ili kaj estas realigitaj multaj artismaj filmoj, dokumentaroj, estas eldonitaj historiaj libroj kaj memoraĵoj. Sed plusilentis multaj genocidoj je rasisma naturo, travivitaj de la popoloj de Eŭropo, estigitaj antaŭ kaj post la Dua Mondmilito, kiuj ankoraŭ traktiĝas kiel tabuaj temoj.

Unu el ĉi tiuj krimoj, kiu karakterizis plejmulte la eventojn dum du jarcentoj (19-20) en Balkanio estas la *Rasismo kontraŭ albanojn*.

Ĉi tiu rasismo, ne inspiriĝis de la tezoj de "natura selekcio" de Darwinismo, nek de tiu pri la "supera raso" de la okcidentaj esploristoj, sed por akiro de la "vivspacoj" por la fremdaj koloniantoj.

La unua holokaŭsto en Eŭropo sur rasaj bazoj estas planita kaj plenumita far registaraj programoj de slavoj nordoriente kaj helena ŝtato sude, kontraŭ la albanan popolon.

Distinge de genocido kontraŭ hebreojn kaj ceteraj eŭropaj popoloj, la rasisma genocido kontraŭ albanojn estas ekzercita kontinue (dum milita kaj paca tempoj) ĝis fine de XX jc.

En la jaro 1913, ankoraŭ antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito, izraela verkisto Leo Frojlih publikigis la libron "Golgota de albanoj" ("Albanienes Golgotha", Wien, 1913).

En ĝi, inkluziviĝas dokumentoj kiuj elmontras la amasajn barbarismaĵojn serbajn en la albanaj regionoj de nordo. Li estis konservinta la kolekcion de ĉiuj grandaj ĵurnaloj de la tempo, elmontrintaj la pereon de almenaŭ duonmiliono da albanoj, far serboj dum la jaroj 1912-1913.

" Centoj kaj miloj kadavroj, masakritaj, flosis laŭ la fluo de la riveroj- skribas Frojdlih pri la okazintaĵoj en Kosovo kaj Makedonio- Tiuj, kiuj sukcesis eskapi la malsanojn, malsaton, kuglojn de la infanteriaj fusiloj kaj grenadoj de la serba artilerio, ariĝis en certaj lokoj kaj mortiĝis per kuglo surkape. Pli malbone trafiĝis tiuj sin kaŝintaj en siaj hejmoj. Post detalaj traserĉadoj, okazintaj pro forrabo kaj oraĵoj, ili facile troviĝis kaj forbuĉiĝis kvazaŭ porkojn. La plej grandaj torturoj trafis la albanajn virinojn, kiuj seksperfortiĝis, enkateniĝis, stakiĝis, kovriĝis per pajlo kaj forbruliĝis vivaj. Se ili estis gravedaj, oni tranĉis ilian ventron kaj eliginte de tie la bebon, ĉi lastan surmetis pinten de bajoneto aŭ de la palisoj. Post la masakrado, la serboj drinkis vinon kaj ekdancis. Okazis ke, dum la buĉado, ili kolektis la sangon per glasoj kaj malfermis la bankedon per ĝi"

"La tagon de leviĝo de la nacia flago en Vlora, je 28-an novembron 1912, apud Skopje kaj Prizren masakriĝis 7 mil albanoj. Multaj vilaĝoj forbruliĝis kaj la ties loĝantaro mortiĝis. En la distrikto de Prishtina, nur dum la periodo 18-an de oktobro- 12-an de novembro 1912, malaperis pro serba terorismo, ĉirkaŭ 5 mil albanoj. (Leo Freundlich, Albanienes Golgotha, Wien, 1913, p.. 8-9) Ankaŭ la kapitulaciintoj mortiĝis kvazaŭ en la buĉejo." (Leo Freundlich, Albanienes Golgotha, Wien, 1913, p. 15-16). (17)

Fraŭlino Edith Durham (1863-1944) rakontas ke, kiam ŝi troviĝis en Montenegro (oktobre 1912), petis viziti Prizren-on:

"Mi demandis montenegranojn kial oni ne permesas min iri tien. Ili ridis kaj diris: Ni apenaŭ postlasis tie albanon kun sentranĉita nazo!" Kaj envere, fraŭlino Durham, dum sia vojaĝo en la nordaj regionoj de Albanio, havis la okazon vidi homojn "kun tranĉitaj nazo kaj lipoj".

La ĉefaj ĵurnaloj kiel "Giornale d'Italia", "Wiener Alge meine Zeitung", "Neue Freie Press", "The Daily Mail", "Reichpost" ka, estis sendintaj siajn militraportistojn, inter ili estis ankaŭ Leon Trocki. En siaj skribaĵoj li donas haŭtremigajn detalojn pri la serbaj krimoj kontraŭ albanojn:

"Tri soldatoj preterpasis min. Mi aŭdis ilian interbabilon: "Nek mi mem scias kiom da albanoj mi estas mortiginta", diris unu el ili- Sed ĉe neniu el ili mi trovis ion valoran. Nur kiam mi buĉis virinon, trovis ĉe ŝi dek orajn lirojn".

Gjergj Fishta⁴ en la Packonferenco 1919 sin esprimis:

"Ho, kiom da kialoj havis tiu praulo kiam estis dirinta "Ubi solitudinem faciunt, pacem appellant." ("Ĵus detruinte la landon, oni starigos poste la pacon")

La arĥivaj dokumentoj de la serba ŝtato, atestas ke dum 164 jaroj, estas konataj 24 serbaj programoj (je tre nerimarkeblaj diferencoj unu disde la alia), kiuj planis detalmaniere la pereigon de albanoj en Kosovo kaj aliaj albanaj teroj. La serbaj registaroj estas agintaj sistemece por la forpelado kaj etna purigado de pli ol 700 etnoalbanaj vilaĝoj de Sanxhak de Nish, de Toplica kaj Kosaonica (1876-1878).

Sufiĉas rememori pri "Nacertania" (1844) de Ilia Garashanin, pri projektoj de Jovan Cvijiĉ (inter la jaroj 1912-1921), ellaborita de Vasa Ĉubriloviĉ (1937, 1944), projektoj de Ivo Andriĉ (1939) kaj Stevan Moleviĉ (1941) ĝis de "Memorandumo" de la Serba Akademio de la Sciencoj kaj Artoj (1986) kaj projekto de Miloŝeviĉ "Ĉiuj serboj en ununura ŝtato" (1990)

Preskaŭ ĉiu serba partio havis po unu "naciisma" programo. Ili konkuris unu kun la alia kiu do solvus "pli bone" kaj porĉiame la aferon de Kosovo. (18)

La dosiero 56, troviĝanta en la Centra Arĥivo de Ŝtato, en la fonduso 410 (Prefektejoj kaj Komunoj de la Liberigitaj Teroj)

Raportoj senditaj de prefektejoj pri la kontinua perfortado de serboj, ekzercita kontraŭ albanojn:

⁴ Renoma albana poeto, katolika pastro

"Unue, la jugoslavoj demandis la enmanigon de la armiloj kaj iu ajn materialo rilatanta al militrimedoj. La ĉitieaj albanoj, post multaj kvazaŭbestaj suferadoj, sen ia ajn kompato kaj humanismo, plenumis la enmanigon demandata.. Post iom da tempo la registaro kunigita sub la nomo "Jugoslavio" organizis volontulan bandon je 2000-3000 serboj kaj montenegranoj kaj sub la komando de majoro Sav Lazar komencis devigi albanojn ŝanĝi la religion ĝistiaman kaj ekkredi al ilia ortodoksismo...Ofte centoj da albanaj viroj enkateniĝis al la kortaj heĝoj, tiel ke iliaj piedoj ne tuŝu la teron, bastonante kaj vipante, malsekiĝis per malvarma akvo dum la vintra tempo, nur ĉar ili ne akceptis la ortodoksismon.

Krome, en la jaro 1929-1930 serboj sendis en la agrokampojn sian kruelan agraran fioficiston kaj starigis limojn meze de la hereditaj teroj de siaj prauloj, samtempe por malriĉigi tutajn albanajn lokulojn. La teroj transpasis je posedo de fremduloj, same la paŝtejoj, legomejoj, arbaroj, florkampoj kaj ĉiu valora terpeco.

Albanoj ekmalriĉiĝis ĝis tiu grado ke eĉ la pano malfacile akiriĝis, tiel ili fariĝis taglaboristoj ĉe serboj en siaj propraj teroj.

La agrara oficisto apenaŭ kontentiĝis tuj, sed aperis de fojo al fojo ĉiam plipezigante la dorson de albanoj lacigitaj kaj pliigante la sekvestritajn surfacojn, ĝis la kortoj de la domoj eĉ ĉe la hejmosojlo.

La serbaj kaj montenegranaj koloniantoj invitis albanojn kaj aparte muslimojn, dirante ke ilia patrio estas Turkio kaj estus pli bone iri frue tien ol pereji pro registaro.

Ofte la ĝendarmaj patroloj tiutempaj eniris la hejmojn kaj fingrodividis tiujn albanajn junulojn, konataj pro personaj kapablecoj kaj saĝeco kaj, ĵus foririnte el la vilaĝo, en la unua torento aŭ kavaĵo trovita, pafmortigis la junulojn surtere kaj enĵetis iliajn kadavrojn en la torenton aŭ kavaĵon.

Ankaŭ en la kazerno de la armeo, ofte la serbaj oficiroj alvokis laŭnomliste albanajn soldatojn kaj post kiam enkatenis ilin, mortigis ilin per mitralado, je manieroj plej fiaj kaj plej perfidaj, ekzerceblaj de rasoj plej malbonaj de la homaro"

...Tiaj okazintaĵoj, kiel praktiko por pereigi albanojn, estas kontinuantaj dum jaroj en la armeo.

La nomlisto de la albanaj personoj sufokitaj far volontuloj de la jugoslava armeo, je 11-15 aprilon 1941, en la regiono de la municipo de Vogovo (sekvas nombro- nomo kaj familia nomo- loĝloko- kredo- dato de la sufokigo) (19)

"Genocido sur rasismaj bazoj" estas la sola nomumo, difinanta precize, la historiajn interrilatojn de la ŝtatoj fonditaj post la falo de la Otomana Imperio kun albanoj. la dispecigo de la albanaj teroj far Grandpotencoj, certigis la sukcesan kontinuecon de la proceso de pereigo kaj aliigo de ĉi tiu loĝantaro granda kaj aŭtoktona en Balkanio.

En la jaro 1944, kiam la popoloj estis konvokitaj ke, kune kun la nazismo, estis finiĝante ankaŭ la rasisma ideologio kaj pereiga genocido, kiam la kredo ke la kono de la homrajtoj kaj de kondamno de la krimoj venkus en Eŭropo, la nordorientaj najbaroj kaj sudaj najbaroj al la

albana popolo revenis al la apliko de iliaj rasismaj programoj el XIX jc ("Nacertanie" kaj "Megali Idea")

Maje 1944, laŭ la decido de la Supera Stabo de Naciliberiga Armeo de Jugoslavio, sub la gvido de Aleksander Rankoviĉ, formiĝis OAN-a (Odelenie za Zaŝitu Naroda- Sekcio de Popola Defendo), speciala forto de la sekreta polico kiu januare 1946 alinomiĝis UDB (Uprava državne bezbednosti/sigurnosti/varnosti).

Al la plej kruela plenumanto de la serba ŝovinismo- Aleksander Rankoviĉ, J.B. Tito estis doninta plenan potencon. Li portis la oficon de la sekretario de la Centra Komitato de Jugoslava Komunista Ligo, ministro pri internaj aferoj kaj vicprezidanto de la Socialista Federativa Jugoslavia Respubliko. OZNA/ UDB, havis kiel taskon la plenumiĝon de la programo el la XIX jc "Nacertanie", kiu per ĉiu rimedo kaj perforto certigus la survivon de la Granda Jugoslavio, sojle kaj post la finiĝo de la Dua Mondmilito.

Ekde la septembro 1944, Miladin Popoviĉ⁵ en letero sendita al ĉiuj politikaj komisaroj en Kosovo, je la nomo de Jugoslava Kompartio skribis:

" Kvankam Kosovo- Metohio estas sen okupantoj, ni ne regas sur la tuta teritorio. Obstaklo estas la armitaj bandoj (legu: albanaj patriotoj) disvastigantaj ŝovinismon. Nun estas nia devo nealiigebla por la purigado de Kosovo kaj Metohio disde ĉi tiuj bandoj, kiujn ni devas likvidi energie kaj senkomplete. La terojn de tiuj, kiuj ne kapitulacias ĝis la difinita tempolimo, estos konsiderataj ŝtataj, tion plenumos la staboj (Naciliberiga Armeo).

En la vilaĝoj kie oni rezistadas, la organizantojn ni enmanigos al la militista juĝejo...dum la vilaĝanojn ni malarmigos..."

La brigadoj de NLA (Naciliberiga Armeo) en Kosovo komencis la malarmigon de la loĝantaro je la nomo de la "purigado de la tereno disde "albanaj kriminalaj bandoj". Je 7-an de februaro 1945, la supera komandanto de NLA, J.B.Tito dum renkontiĝo kun serbaj militistoj: Savo Derleviĉ, Gjuro Medenica kaj Kersto Filipoviĉ en Belgrado, starigis sian programon por la estonto de Kosovo post la finiĝo de la Milito. Per la ordono nr 31 de 8-a de februaro 1945, estis decidita la militista administracio en Kosovo sub la komando de serbo-montenegranoj, igante jam "faritan fakton" la okupacion. Tiu okupanta jugoslava militista maŝinaro, je la nomo de "purigado" de la tereno disde "postrestaĵoj de faŝismo" kaj "kontraŭrevoluciuloj" mortigis kaj masakris milojn da albanoj tra la tuta Kosovo.

Dum la jaro 1944 ĝis la jaro 1947, laŭ Xheladin Hana (membro de Komitato de NLA, mortigita je 15.02.1948, far UDB), la okupantaj militistaj serboslavaj fortoj gviditaj de Tito, estas mortigintaj kruelece ĉirkaŭ 86 mil albanojn.

5 Eksa jugoslava delegito en Albanio dum milito kaj poste estro de komunistoj en Kosovo

Tuj post 1945, en Jugoslavio oni reekspluatis la naziajn koncentrejojn aŭ konstruis novajn, kiel en Borovnice, Aidussina, Goli Otok, Maribor, Skofia Loka, Sveti Grgur. Unu el la suferintoj de ĉi tiuj mortigaj fabrikoj estis ankaŭ la patrioto Adem Demaĉi⁶. Hodiaŭ oni ne scias precize la nombron de la viktimoj, ĉar la notlibroj de ĉi tiuj tendaroj, laŭ la ordono de Tito, malaperis kaj la mortigitoj aŭ la mortintoj pro torturo estas enĵetitaj en la abismojn, en la maron aŭ en la amasajn tombejojn. (20)

La historiisto Gjok Debaj, alportante en siaj studoj, la dujarcentajn rasismajn krimojn kontraŭ albanojn, far serboslavoj norde kaj helenoj sude, sin esprimas:

" Ĉi tiu nia kalendaro de la martiroj ne rememoris nur unu martiron en certa tago, sed ĉiu el niaj tagoj portus surdorse je dekoj, je centoj kaj kelkfoje je miloj da martiroj, eterne ne konsoleblaj".

IV La vojo al la morto

Tiu nomumo estis donita al la amasaj translokiĝoj de la diversaj loĝantaroj, en la lasta jaro kaj post la Dua Mondmilito, plenumitaj de Jugoslavio de Tito kaj aliaj eŭropaj ŝtatoj.

"La vojo al la morto" de albanoj plenumiĝis de la titista ŝtato dum la monatoj marto-aprilo 1945. (Prizren- Kukes- Shkoder- Tivar), kiu en nia historio konatas per la nomo "Masakro de Tivar". (la masakro estas spegulita de la esploristo Uran Butka en la libro "Masakro de Tivar")

Post kiam estis instalita la militista reĝimo en Kosovo, mortigante la albanajn "teroristojn", forrabinte ilian riĉaĵon, forbruliginte tutajn vilaĝojn kaj malarminte la loĝantaron, la jugoslava gvidantaro, deklaris la mobilizadon de la brigadoj de "Kosmet"⁷ por la fronto de Srem, norde de Serbio. Sed oni devus forigi unue la armitajn partizanajn fortojn de albanoj.

Komence de januaro 1945, la Operacanta Stabo de "Kosmet" ordonis la Stabon de la Brigado de Shaban Palluzha, ellasi Drenico-n kaj ekiru je direkto de Podujevo, kie ĝi devus kuniĝu al la VII brigado de "Kosmet", por daŭrigi la vojon al Serbio (Kurshumli- Banje de Kurshumli- Prokuple- Srem). La forigo de la viroj kaj junularo armita el Kosovo kaj Makedonio, en la ondo de la perforto de la titista armeo, kaŭzis la kontraŭstariĝon de la albana loĝantaro.

⁶ Eminentia eksa politika prizonulo en Kosovo

⁷ Tiel la slavo nomis Kosovon tiutempe (Kosovo kaj Metohio)

Je 11.03.1945, en Gjakove oni organizis demonstracion de la virinoj kontraŭ la perfortan mobilizadon, de la knaboj, fratoj kaj viroj iliaj. Multaj albanoj kaj partizanaj formacioj, evitante la mobiliziĝon, aliĝis al la vicoj de la grupoj de rezistado. Ili konsideriĝis "dezertintoj" kaj "perfiduloj".

Sojle de la liberiĝo disde naziismo, la jugoslava titista armeo komencis la genocidon sur la senkulpa loĝantaro je preteksto de persekvado de dezertintoj kaj "purigado de la tereno disde albanaj reakciantaj fortoj".

Dum la monatoj januaro-aprilo 1945, estis perforte mobilizitaj ĉirkaŭ 44523 albanoj el Kosovo kaj aliaj etnaj regionoj, por la frontoj, tielnomataj, de "Srem" kaj "Adriatik". La mobilizitoj perforte (marto-aprilo 1945) ariĝis en la militistaj kazernoj de Prizren. Malarmigite, per la rezono ke "la armilojn ili prenis en Kroatio kaj Slovenio!", formiĝis tri kolonoj, jam kvazaŭ militkaptitojn, por ekiru laŭ la vojo Prizren- Kukes- Shkoder- Tivar- Dubrovnik- Rjeka.

Ilian kondukadon oni komisiis al la brigado 27 de la serba divizio 46, konata pro terorizado de la albana popolo dum la pasintaj monatoj.

La unua grupo el 3700 personoj, ekiris je 24.03.1945 kaj post 6-taga vojaĝado kun bestiecaj mistraktadoj far la kondukantoj serbo-montenegranaj, alvenis en Tivar kaj enmaniĝis al la jugoslava 9-a divizio.

La dua grupo konsistanta el 4700 personoj, kondukata de titistaj partizanoj de brigado 27, post du tagoj komencis la marŝadon kvartagan laŭ la vojo Prizren- Zhur- Puke- Shkoder.

La unuaj murdoj okazis noktomezon de 26/27 marto dum halto en Kukes. Laŭ la antaŭdifinita plano, en la tempo kiam la kolono de albanoj dormis, oni mortigis kruele ĉirkaŭ 120-140 personojn kaj iliajn kadavrojn enĵetis en abismon. Sub celado submetiĝis albanaj komandantoj de la unuoj, ariĝintaj en Prizren.

La albanoj komprenis ke ili ne estis irante militi kontraŭ nazian armeon, sed al la morto. Sub la fusilaj paftuboj, la kolono nokton 28/29 marto transpasis la arbaran valon en periferio de Puka, postlasinte dumvoje la korpojn de la kamaradoj kiujn pro torturoj, venenadoj per nutraĵoj kaj malvarmo, la mateno trovis mortintaj.

Dum la transpaso ĉe "Ponto de Zog" kiu estis detruita, per vagono-telfero inventita, enfalis en la riveron ĉirkaŭ 50 personoj, kies plimulto trovis morton.

Je 30-an de marto, la serbo-montenegraj soldatoj kondukantaj, ne permesis al ŝkodranoj, elirintaj kun nutraĵoj kaj akvo por siaj fratoj el Kosovo, sed kondukis ilin en la urbajn montetojn kaj dum noktomezo de 31-a marto, ankoraŭ ne rekapabliĝinte pro longa vojaĝo kaj malsato, ekirigis ilin je direkto de Ulqin.



Kolonoj de albanaj junuloj marŝantaj al la morto, martofine 1945

Ĵus transpasinte la landlimon (apud Ulqin), la kolono estas haltinte kvazaŭ por ripozi. Ĉiujn malsanulojn kaj vunditojn oni apartigis disde siaj kamaradoj, je preteksto "por eviti iun eventualan epidemion" kaj ĉar ilin oni kondukus en hospitalo de Montenegro. Neniam oni eksciis ion pri ilia sorto.

Tagmezon de la 1-a de aprilo 1945 ili alvenis en Tivar. Tiun fatalan tagon, tra la stratoj de la urbo vidiĝis mobiliziĝo de la serbo-montenegraj soldatoj, kiuj rigardis malestime la longan kolonon de la albanoj. Centre de la urbo, oni ordonis ĝin halti por ripozi. Elĉerpitaj pro la vojaĝo kaj soifaj je akvo, kvar albanoj alproksimiĝis ĉe akvofonto. La kondukantaj gardistoj forigis ilin alfrapinte per la fusilaj paftuboj kaj kaŭzante tiel ilian kontraŭstariĝon pro tiu malhumana ago. Tuj la soldatoj ekpafadis al albanoj. Tiu ago de la serbaj soldatoj, pretigita intence meze de la urboplaco, servis kiel signalon por la komenco de la pafado per fusiloj kaj mitraloj, lokigitaj en ĉiu stratangulo, el la fenestroj kaj terasoj de la domoj ĉirkaŭ la urboplaco de Tivar kaj sur la ĉirkaŭantaj montetoj. (21)

Azem Hajdini, unu el la survivintoj, rakontas la sekvon de la masakro:

"Ni estis enviciĝinte laŭ kolono po kvar personoj, je longeco 5-6 km kaj la ebleco por amasa pereado estis malgranda. Oni ordonis nin leviĝi surpiede kaj, per katenitaj manoj malantaŭ la kapo, pluiru je direkto de domego trietaĝa troviĝinta meze de rokaj montetoj. La korto estis ĉirkaŭita per altaj feraj muroj finiĝantaj per akraj pintoj. Estis elektita taŭga loko por amasa murdo.

Enirante en la korton, 10-15 soldatoj kun ferstangoj frapis sur niajn kapojn, brustojn aŭ dorsojn, lasante surtere mortajn 100 - 150 personojn. En la domegon sukcesis eniri 100 personoj kaj ceteraj 2200- 2500 restis en la korto. Ĉirkaŭ la 14-a horo komenciĝis la frapado

per aŭtamataj fusiloj, mitraloj, bombardiloj kaj manbomboj sur la albanajn rekrutojn kaj ene de horo, neniu homo restis surpiede. La placo de la korto kovriĝis de sango dum la domo transformiĝis en ruinaĵon, kun centoj da kadavroj ene de ĝi. La ekzekutistoj, por certiĝi ĉu restis kelkiu ankoraŭ viva sub la senvivaj korpoj de siaj kamaradoj, je la nomo de la "stabo", alvokis:

"Estas informataj ĉiuj ankoraŭ vivaj aŭ vunditaj, ke la supera komandanto de NLA, kamarado Tito estas ordoninta la ĉesadon de la fajro kaj ĉiuj estas pardonitaj- sendepende de eraroj faritaj!!! Al ĉiuj vunditoj oni donos medikan helpon...Ni demandas ke vi ovaciu: "Vivu kamarado Tito!", "Vivu unueco - frateco!", "Vivu Naciliberiga armeo!" ks.

Kredante la alvokon, la plimulto de la vunditoj leviĝis por peti medikan helpon. Sed ...kio okazis...?! La soldatoj elanis kvazaŭ bestiojn sur ilin kaj masakrigis senkompate."

Por kaŝi la spurojn de ĉi tiu kruela ago, moliziĝis ĉiuj militistaj unuoj serbo-montenegraj, civitanoj kaj laboristoj de ĉi tiu nacieco kaj, per kamionoj, vagonetoj, ĉaroj ks dum la tuta nokto transportis la kadavrojn kaj la vunditojn (kune!!!) je direkto al la Malnova Tivar, ĉe abismo meze de la marrokoj. Parton de la kadavroj oni unue forbruligis kaj poste enĵetis en la abismon, dum la ceteron entombigis...!!! (22)

Aleksander Rankoviĉ kaj la titista ŝtato, ĉi tiun eventon kvalifikis pezan kaj kaŭzitan de mem albanoj!! Nur post 51 jaroj, je 20.09.1996, la norvega TV sciigis pri la malkovro de amasa tombejo apud Tivar kun 2 mil viktimoj de la mortigitaj albanoj je 1-an de aprilo 1945.

La tria grupo, el 2700 personoj, ekiris de Prizren je 27-an de marto 1945 kaj kondukiĝis de fifama brigado 27. Multaj albanoj dum la longa kaj peniga vojaĝo, pro manko de la nutraĵoj kaj higieno, malsaniĝis pro tifo kaj dekoj el ili mortis survoje. Vesperon de 2-a de aprilo, ĉi tiu grupo alvenis en Tivar kaj enmaniĝis al 7-a dalmata divizio. De Tivar, per ŝipo, ĝi transportiĝis al Dubrovnik kie lokiĝis en kelkaj loĝejoj.

Grupo el 800 personoj, lokiĝintaj en pulvodeponejo, veneniĝis dumnokte kaj matene vekigi ŝvelintaj. Dumtage mortis ĉiuj. (23)

Tiu politiko dujarcenta de slavo por la rasisma pereigo de albanoj, atingis sian kulminon lastan (kiam krimo ampleksis la tutan loĝantaron) dum la jaroj 1998-1999.

V La fina solvo

La nomumo "fina solvo" (Endlösung der Judenfrage) uziĝis de nazioj fine de la jaro 1940, planita kiel lasta paŝo de la rasisma programo por pereigo de hebreoj. Hodiaŭ ĉi tiu agado konatas per la nomo "holokaŭsto" kaj vaste uzatis ankaŭ en Eŭropo la unuajn jarojn post la Dua

Mondmilito. La celo estis pereigo de la etnaj loĝantaroj, ne sekve de la militaj bataloj, sed dank' al planitaj murdadoj malvarmsange kaj malhumane.

La etna genocido estis kondamnita kiel politika kaj pseŭdosciencia agado, per la proklamigo en la jaro 1950 far UNESCO de la "Deklaracio pri la rasoj", sed tio ne notis la finon de la rasisma ideologio kaj agado. La eŭropaj politikfarantoj, malgraŭ la evoluintaj okazintaĵoj, ne volas konfesi ke tiu ideologio kontraŭ la albanan etnion, daŭre gvidas la agadon de kelkaj balkanaj ŝtatoj ankoraŭ hodiaŭ.

En la fama "Memorandumo" de la Akademio de Sciencoj kaj Artoj de Belgrado el la jaro 1986, la naciisma verkisto serba Dobriva Kosiĉ, prezidanto de la "Nova Jugoslavio" de Miloŝeviĉ en la jaro 1992, deklaris: "La eta purigado estas aganta por kreiĝo de Granda serbio" (...), la sukceso de ĉiu militista ago dependas de pereigo disde teritorio de la fremdaj loĝantaroj" (24)

La kontraŭalbana platformo pri etna purigado de Kosovo, estas pretigita de "Patriema Centra Komitato de la Radikala Serba Partio" (SRS), subskribita de la ties prezidanto Vojislav Ŝešel, vicĉefministro de Serbio kaj vicprezidanto de Partio Tomislav Nikoloĉ, Nikola Poplaŝen, Maja Gojkoviĉ, Ranko Dujiĉ kaj Aqim Viŝnjiĉ, samkiel la Ĝenerala Sekretario de la Serba Radikala Partio Aleksander Vuĉiĉ.

Ĉi tiu platformo publikigis sur la ĵurnalo "Granda Serbio" (*Velika Serbia*), je 14-an de oktobro 1995 en Belgrado kaj en la jaro 1997 de la Centro "Global Communicators" en Washington, D. C. (25)



Amasaj tombejoj en Kosovo

Sed kiel ĉiu politiko-militista strategio, por estiĝu, devus pretiĝi ĝiaj plenumantoj t.e. la soldatoj kaj jugoslavaj civitanoj. La historio de XX jc estas atestinta ke la etna rasismo (kiel iu ajn rasismo) estas plenumita anticipe kiel spirita nutraĵo inspirita jam en la lernejoj, en la ŝtata administracio, en la armeo, amaskomunikiloj kaj en la religiaj institucioj. La malamo kontraŭ la albanan popolon estas la konkludo de ĉi tiu kleriga, kultura, militista kaj religia agadoj de la najbaraj landoj, kreinta la "bestiojn" kiuj estigis la pereigajn planojn de la militista aparato de Miloŝeviĉ en Kosovo.

La serba epika heroeca poezio, kiel tio dediĉita al Kraleviĉ Marko, por la intelektuloj de la Akademio de Sciencoj, konsideriĝis "scienca" heredaĵo de la tradicio. Ĝi levas la makabrajn krimojn far la herooj kiel: la senkapigoj de malamikoj per tranĉilo malvarmsange, eligon de la ties okuloj, amputigon, fajrobruligon, detruon de la riĉaĵo de la kontraŭulo kaj ekspluaton de la perfideco por venki la kontraŭulon kaj kultivis la senton de la supereco sur la ceterajn popolojn.

La membro de la Serba Akademio, Antonije Isakoviĉ, substrekis:

"Niaj mitoj igas nin fortaj kaj ni devas kunvivi kun ili. Kiomfoje ni troviĝis meze de malfacilaĵoj, ni venis en Kosovo, ĉe Karaĝorĝ kaj popola poezio..."

Vidovdan

Rigardas mi la ĉielon, jarcentojn pasantajn

Pratempaj memoraĵoj estas la sola kuracilo

Ien ajn mi iras, ĉe vi mi turniĝas denove

Ĉar neniu povas deŝiri de mia spirito Kosovon

Kiel fajron eternan en niaj koroj

La Kosovo milito restas la sola klareco...

(Vidovan estas kanzono el la serba epopeo kantata ĉiun 28-an junion, tagon de Sankta Vidovdan, kiam oni rememoras la perdon en la batalo kontraŭ turkojn en Kosovo-Polje, apud Prishtina en la jaro 1389)

Tiaj kanzonoj verkiĝis ankaŭ por la serĉatoj de Tribunalo de Hago pro militkrimoj kiel Radovan Karaĝiĉ, Ratko Mladiĉ kaj aliaj. (26)

La misuzo de historio pro rasismaj celoj kaj la nutrado de la malamo, esprimiĝas ankaŭ en la postmilitaj lernolibroj de historio, beletro, geografio, artoj kaj sociaj konoj ekde la unua klaso elementa ĝis la supera klerigado, ekzemple en la lernolibro de historio por la oka klaso oni skribas:

"Dum la periodo 1941-1944 estas likviditaj 10 000 serboj, dum estas translokigitaj perforte far albana teroro 100 000".

Ankoraŭ oni uzas la ofendan nomumon "ŝiptari", "arnauti" por albanoj prezentante ilin kiel "islamigitajn serbojn". (27)

Vasa Cubriloviĉ (ministro de Tito kaj konsilanto de Miloŝeviĉ ĝis li mortis en la jaro 1991), kiu en la jaro 1937 estis ellaborinta la manifeston "La forpelo de la albanoj" (Iscljavanje Arnauta) envicigis en sia projekto de la scienca purigado, la manierojn por atingi la kondiĉojn por la amasa forpelo:

"Neniu ago bezonas tiom da atento kaj pacienco. Por havi amasan forigon, la unua kondiĉo estas la kreado de taŭga psikologio, kiu povus efiki en multaj manieroj".

Unu el ĉi tiuj "taŭgaj psikologioj" en la strategio de la "lasta milito" kontraŭ albanan loĝantaron, eble la plej grava, estis la krimoj kontraŭ la albanan virinon.

La plej peza frapo kontraŭ albanan virinon estis la turmentado kaj murdo de la infanoj. "Interna raporto", kvalifikita "tro sekreta", kompilita de la sekretaj servoj de la Jugoslava armeo, januaro/februaro 2000, donas vidaĵon el la teruraj krimoj plenumitaj de la serbaj militistaj fortoj dum printempo 1999 en Kosovo. La raporto estis kompilita por IWPR. "La serbaj oficiroj rakontas pri la krimoj", eldonita je 4-an de aprilo 2000, de la ĵurnalisto Miroslav Filipoviĉ el Kralevo:

"La komunaj atestaĵoj de la oficiroj en la tereno, montras ke la unuoj de la Jugoslava Armeo estas murdintaj kruele almenaŭ 800 infanojn je aĝo malpli ol kvin jara".

La atestaĵo: "Serba soldato vokata "Cmi" alproksimiĝis maljunulon, kiu tenis permane infanon ĉirkaŭ tri aŭ kvar jara. Li forprenis la infanon disde la manojde maljunulo kaj demandis de la maljunulo pagon je 20 000 germanaj markoj. Vidinte ke la albano havis nur 5000 germanajn markojn, li kaptis la infanon per hararo, eligis tranĉilon el la zono kaj senkapigis la infanon. - 5000 germanaj markoj sufiĉas nur por la korpo!- diris li kaj aliris antaŭ la ceteraj vilaĝanoj, tenante enmane la kapon de la infano per hararo. Tuto tio okazis antaŭ la okuloj de dekoj da homoj, rakontas Vladimir. Ni estis ĉiuj en ŝoka stato, dum nia junaĝa subleŭtenanto svenis antaŭ tia makabra vidaĵo de la korpo senkape surtere. "Cmi" poste sin deklaris malresponsebla mentale, maldungiĝis kaj sendiĝis hejmen. Sed li ankoraŭ estas libera, kvankam plenumis ĉi tiun teruran krimon.

Dubinda estas la fakto ĉu ili iam sin prezentos antaŭ la tribunalo. Multaj el ili kontraŭe, estas gradiĝintaj kaj leviĝintaj en la postenoj" (28)

En la strategio de la "fina milito" ampleksiĝis preter la militistaj fortoj, ankaŭ la civila serba loĝantaro, kiu donis informaĵojn, forrabis kaj parto el ĝi aktive partoprenis en la pereigo de albanoj. Kvankam, por sin kaŝi disde la najbaroj ili uzadis maskojn, iliaj nomoj malkaŝiĝis. Tion eksplikas la fakto ke multaj el ili ne kuraĝas reveni Kosovon por kunvivi apud siaj viktimoj.

Dum la tuta XX jc, en la historio de Eŭropo, apenaŭ troveblas simila ekzemplo rilate la krimojn plenumitaj kontraŭ la albanan virinon dum la jaroj 1998-1999.

La atestaĵo de R.N. el Prishtina, trovita katenigite en la lokalo de la Jura Fakultato, post la retiriĝo de la serbo-montenegraj fortoj:

"Oni diris ke oni enketadus min; unu el ili ordonis min senvestiĝi kaj resti tiel kiel mi naskiĝis. Mi rifuzis. Milicisto manfrapis min kaj tuj sango eksplodis sur miaj lipoj varmegaj. la alia surmetis fingron sur miajn lipojn, ŝmiris ĝin kaj diris: "Videblas, ĉiuj albanoj havas dolĉan sangan kaj mi per ĉi tiu tranĉilo ekĝuos ĉiujn".

Fininte la laboron, la bestio ordonis unu el la kolegoj liaj ekbruligi cigaredon. Mi pene eltenis min, tute elĉerpita. Kun la bruligita cigaredo li alproksimniĝis kaj aldiris:

"Mi, Nenad Stojanoviĉ, postlasos memoraĵoj por la tuta vivo. Eble vi, bela kaj juna, volas ĝui la vivon, sed mi mortigos malrapide-malrapide kaj alproksimigis la cigaredon ĉe miajn mamojn kaj estingis ĝin tie. Pli ol pakedon da cigaredoj li estingis sur mian korpon dum kelkaj horoj.


En neniu filmo mi vidis tian torturon. La morgaŭon, ĵus elkatenigitaj min, ili seksperfortis min laŭvice. Mi ne scias kiom da viroj estas ludintaj per mia korpo, ĝis kiam mi rekapabliĝis. Ankoraŭ hodiaŭ, mi havas sur mia korpo centojn da vundoj pro cigaredoj kaj tranĉilajn vundojn, kie videblas multvariaj serbaj vortoj. Kelkaj tagoj pli poste mi vidis min en nekonata ĉambro de vilaĝo, oni estis forpreninta kaj kuracinta min tie. Oni kuracis la vundojn faritajn per tranĉilo pentrante per ties klingo sur mia haŭto". (29)



Seksperfortita kaj poste mortigita virino en Kosovo

La neregistara virina organizaĵo "La vivo en Kastriot", gvidata de Luljeta Selimi, prizorganta 2016 albanajn virinojn, seksperfortitajn de la serbo-montenegraj fortoj atestas ke 126 el ili havas videblajn vundojn surkorpe (hakitajn mamojn, ŝiritajn fingrojn, naŭ el ili estas unuokulaj kaj dek ses kun malfermitaj vundoj survizaĝe). Ilia sana kaj psika stato estas peza.

Shaip Vrellaku, kiu estis kaptito de serbaj fortoj troviĝis en la stacidomo de Glllogoc: " Per miaj okuloj mi vidis la policiston bruligante la knabinojn seksperfortitajn en la stacidomo de Glllogoc. Ankoraŭ hodiaŭ mi aŭdas tiujn terurajn kaj tristajn kriojn de la bruliĝantaj knabinoj". (30)



Dokumenta de la sekreta serba polico trovita de NATO-a soldatoj

Hodiaŭ kuraĝaj historiistoj kaj intelektuloj, estas eligante el la profundoj de la Arĥivoj kaj diskonigante la faktojn pri la genocido kaj rasismo kontraŭ la popolojn, kiu kaŭzis multajn viktimojn ĉe civila loĝantaro, dum kaj post la Dua Mondmilito en Eŭropo.

Estas ŝtatoj kiuj kondamnas ĉi tiun ideologion kaj konservas la atestaĵojn de ties sekvaĵoj por elmontri la ties danĝerecon. Sed ne ĉiuj ŝtatoj agas tiel...

En la XIX jc, franco, Pris de Avene (Prisse d'Avenue 1807-1879) pasiigita al la egipta arto, aĉetis apud Tebo papiruson enhavinta la solan kopion de la Maksimoj de Ptahhtep (plej distingita klerulo de Egipto faraoneca). En la ties Maksimo 36 oni skribas:

"La sincera humanismo, kredanta al la natura boneco de la homo, faras tragikan eraron; tio apenaŭ korektiĝas spontanee. La krimo restas nepunita, turnas tion plenumintan en sturmanton kaj detruanton". (31)

La hodiaŭaj evoluoj de la eŭropa politiko, atestas pri la neceso de la agnosko kaj kondamno de la "kaŝitaj" krimoj ankaŭ en Balkanio, kiel estas: la rasisma genocido dujarcenta kontraŭ albanojn.

Tiu akto devas fariĝi, pro historia paco inter la balkanaj kaj eŭropaj popoloj (ĉar la rasismo ne konas limojn), por ke oni kondamnu la politikan ideologion de la rekomepencoj pro "ekvilibro" inter la Grandpotencoj de XIX-XX jc, kiu daŭras ankoraŭ hodiaŭ teni bruligitan la meĉon de la kriminalaj militoj.

31.04.2014

Bibliografio

- 1-“Shqiptaret ne tekstet shkollore te Serbise dhe te rajonit” Mazllom Kumnova Educologia 5/2011. Universiteti i Prishtinës - Fakulteti i Edukimit)
 - 2- <http://www.glas-javnosti.rs/dodaci/vehabije-haraju-srbijom/nove-knjige-otmica-kosova>
 - 3- L'antinezionismo nell'esperienza giuridica tedesca e comparata
polis.unipmn.it/pubbl/RePEc/uca/.../luther121.pdf –
 - 4- Albert Nikolla "Akuza që ulërijnë"
 - 5- <http://www.kombetare.al/identiteti-etnik-dhe-struktura-demografike-e-trojeve-shqiptare-ne-prag-te-shpalljes-se-pavaresise/>
 - 6- <http://gazetadita.al/austriaket-ne-1869-shqiptaret-mund-te-behen-zoter-te-rajonit-2/>
 - 7- http://fr.wikipedia.org/wiki/Halford_John_Mackinder
 - 8- <http://gazetadita.al/austriaket-ne-1869-shqiptaret-mund-te-behen-zoter-te-rajonit-2/>
 - 9- “Kerkesat patollogjike fashiste” Qerim Pllana, 2012, INA“iliria news agency”
 - 10- Gjurmime albanologjike, seria e shkencave historike IX-1979, Prishtinë, 1980, fq. 142).
 - 11- Dosja 58 – Përmasat e barbarise serbe mbi shqiptaret- Veli Haklaj, www.pashtriku.org
 - 12- Demir Krasniqi: “Shpërnguljet e shqiptarëve në këngët tona popullore”
 - 13- http://www.huffingtonpost.it/daniele-scalea/hj-mackinder-un-filosofo-dellequilibrio_b_4120701.html)
 - 14- f 182 Nuri Dragoi “Shqiperia dhe Greqia” 2009.
 - 15- f199 N.Dragoi po aty
 - 16- f231 N.Dragoi po aty
 - 17- Albert Nikolla “Akuzat që ulërijnë”
 - 18- http://pashtriku.beepworld.de/files/kosova_2010/prill_2010/14-18.10/Fitnete_Ramosaj_pjese_nga_vellimi_i_dyte_i_librit_18.4.10.htm)
 - 19- Dosja 58 “Përmasat e barbarisë serbe mbi shqiptaret” Veli Haklaj www.pashtriku.org)
 - 20- Sheradin Berisha Publikuar më 21 janar 2012
<http://www.albaniapress.com/lajme/15668/Shembelltyra-e-J-B-Titos-ne-studimet-e-Ibrahim-Rugoves.html>
 - 21- <http://www.albaniapress.com/lajme/5496/Si-ndodhi-masakra-e-Tivarit-me-1-prill-1945.html>)
 - 22- <http://www.albaniapress.com/lajme/15668/Shembelltyra-e-J-B-Titos-ne-studimet-e-Ibrahim-Rugoves.html>
 - 23- <http://www.albaniapress.com/lajme/5496/Si-ndodhi-masakra-e-Tivarit-me-1-prill-1945.html>)
-

24- http://www.lefoibe.it/approfondimenti/dossier_web1.pdf

25- http://pashtriku.beepworld.de/files/kosova_2010/prill_2010/14-18.10/Fitnete_Ramosaj_pjese_nga_vellimi_i_dyte_i_librit_18.4.10.htm)

26- <http://www.ossin.org/kosovo/i-giorni-della-spiritualita-e-del-raccoglimento-vissuti-nel-kosovo-martoriato.html>

27- "Shqiptaret ne tekstet shkollore te Serbise dhe te rajonit" Mazllom Kumnova- Educologia 5/2011. Universiteti i Prishtinës - Fakulteti i Edukimit

28- "USHTRIA JUGOSLLAVE" PËRGJEGJËSE PËR VRASJEN E TË PAKTËN 800 FËMIJËVE GJATË LUFTËS NË KOSOVË

29- Pashtriku - krimet - Riza Lani: unë, Dragan spasiq jam njeriu që me ... www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=139)

30- Pashtriku - krimet - Fitnete Ramosaj: Përdhunimet si krime lufte www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=1630)

31- p. 36, "La instruoj de Ptahhotep- La plej praa libro de la mondo, Logoreci, 2006

(Enesperantigis: Bardhyl Selimi, aprilo 2014)

Politiko

Disputoj pri Krimeo kaj Ukrainio

- Mi ne estas tre kontenta pro tio, kion Putin faras aŭ volas fari.

Sed... Ĉu vere NUR SANGO, nur genocido estas kaŭzo por homom mem decidis pri sia sorto? Kial ilian sorton devas determini ĉiujm krom ili mem? Se leĝoj estas tiaj... do estas malbonaj leĝoj, kiuj nur tensiigas la mondon.

Ukrajnoj vere ne murdis krimeanojn, ne malpermesis lingvojn. Sed ukrainoj konstante krimeanojn incitis. Ĉikanis, "trolis". Kaj permesadis, ke "baldaŭ ili ĉiuj ekparolos ukrainan".

Laŭ leĝo oni povas nomi rusojn "okupantoj". Sed sebastopolanoj mem diras, ke veraj okupantoj por ili estas ĝuste ukrainoj! Ukrainoj – kun ilia totala nekapableco al iu ajn kompromiso kaj strebo ukrainigi la tutan landon (nur laŭ vortoj, tamen). Sed "laŭ nunaj leĝoj" ĉio estas "tute normale". Neniu zorgas pri realaj sentoj de homoj.

Ukrainio estas tre diversa en diversaj regionoj, kaj problemoj estas, ke ĉiu parto volas devigi la tutan landon vivi tiel, kiel ĝi volas. Aliaj "devas subiĝi", eĉ se ili estas preskaŭ duono de la tuta lando. Kaj partoj estas vere diversaj – ĉu ie ajn en Eŭropo eblas, ke en unu regiono estas 80-90% por unu kandidato, kaj en la alia – 80-90% por la alia?

Kion do fari?

**Aleksandro Mitin <aleks.stephan@gmail.com>:
Bardhyl!**

- Se oni respektus la homrajtojn, interalie la naciajn rajtojn (lingvo, memregado, edukstemo, kulturo propra ks) ĉio glatus. En landoj kiel Ukrainio kie rusoj konsistigas plimulton en certaj regionoj oni nepre devus respekti tiujn homrajtojn. Por mi bona solvo estus kreiĝo de federacia ŝtato simile al Svisio kie la rusoj, tataroj kaj aliaj popoloj povus senti sin pli sekuraj kaj pli komfortaj. Nenia malbono trovus mem ukrainanojn pro tiu federacio. Des pli ambaŭ popoloj estas slavaj kaj parolas similan lingvon.
- Bardhyl

Jes, sed la ukrainaj naciistoj, akirintaj potencon en puĉo, absolute rifuzas tion.
Melnikov

> Aliflanke Rusio kiel grandega kaj fortega lando devus esti pli tolerema kaj tute ne enmiksiĝu en la internaj problemoj de Ukrainio.

Bardhyl

Rusio ja ne enmiksiĝas!

Ne rusiaj reprezentantoj tage-nokte ĉeestis en "majdano".

Kievon kaŝe vizitis, por ordoni al ukrainaj sekret-servoj, la ĉefo de usona CIA, ne de rusia FSB.

Melnikov

> Ĝi certe devus levi la voĉon defende al la homrajtoj de rusoj tie sed en diplomaciaj rangoj ambaŭflankaj kaj internaciaj.

Bardhyl

Ĝi ja faras tion, sed EU k Usono eĉ ne volas aŭdi k ĉiel penas silentigi.



Melnikov

> la ekzemplo de Georgio kaj Krimeo atestas pri negativa konduto.

Bardhyl

Kial??

Se Saakaŝvili murdas ĉiujn abŝazojn k osetojn en Kartvelio, laŭ ekzemplo de lia adorata idolo Hitler (kiu strebis ekstermi ĉiujn judojn) - ĉu estus pli bone??

Ĉu aligo de GDR al FRG ne estis la samo kiel aligo de Krimeo al Rusio? Indiku la diferencojn.

Melnikov

> La iama Rusio laŭ Lenin estis granda popolprizono. Multaj nerusaj popoloj ekde jarcentoj devus subiĝi al rusigo en ĉiuj aspektoj anstataŭ profiti de civilizo rusa.

Bardhyl

Jes, en publikaj lokoj oni devis paroli nur ruse, multaj malgrandaj lingvoj eĉ ne havis skribon.

USSR donis al ĉiuj popoloj eblecon libere uzi siajn lingvojn. Aperis interne naciaj respublikoj k aŭtonomaj regionoj.

Eĉ post perforta detruo de USSR en 1991 Rusio restis multnacia lando, k oni plu uzas diversajn lokajn lingvojn en siaj regionoj.

Sed Ukrainio fakte malpermesis la rusan lingvon k ĉie emfazis "Ukrainio ne estas Rusio!" Ĉar sen tio ne ekzistas raciaj kaŭzoj por la karikaturo "sendependeco".

Melnikov

> Rusio devas montri al la mondo ke ĝi estas demokratiigante mem unue kaj poste speguligi tiun demokration al ĝiaj najbaroj.

Bardhyl

Rusio ĝuste tion faras, sed okcidentaj amaskomunikiloj mensogegas pri tio.

Melnikov

ĉu nur Rusio ne mensogas? Ĉu vere la tuta mondo mensogas, nur Rusio estas senmakula se temas pri propagando kaj vero? Nur en Rusio floras demokratio? Ĉu vi estas certa pri tio? Ĉu vi kredas tion, ĉu - laŭ via diro - vi tutcerte scias tion?

Dorota

Ve, sed nun por ukrainoj la vorto "federacio" estas kvazaŭ blasfemo.

Ili certas, ke estas vojo al riunuĝo de la lando. Serange, sed estas ilia penso. Mi tion tute ne komprenas. Verŝajne, NUN vere estas tiu danĝero. Ankaŭ ili timas, ke nuna federaciigo iros laŭ plano de Putin, do li "forvoros nin, pecon post peco"... Sed kial do ili ne faris la federacion antaŭe, laŭ sia plano, sen influo de iu ajn?

Por normala lando kun simila situacio estus eĉ bone, ke homoj estas diversaj, ĉar tia lando ne havos tiranon: ĉiam estos forta opozicio, "ŝirmado kontraŭ stultulo".

Sed ukrainoj ne sukcesis, ve... Kaj eĉ post nuna Eŭromajdano ili ne sukcesos, ĉar venkis unu parto, kiu denove ne aŭskultas la alian...

Ne faktas, ke Krimeo ekvolis iĝi "neagnoskebla" teritorio, se homoj ne aŭskultis konstante "Kiu ne saltas, estas Moskvanaĉo"))

Do jen..

Melnikov

La iama Rusio laŭ Lenin estis granda popolprizono. Multaj nerusaj popoloj ekde jarcentoj devus subiĝi al rusigo en ĉiuj aspektoj anstataŭ profiti de civilizo rusa. Rusio devas montri al la mondo ke ĝi estas demokratiigante mem unue kaj poste speguligi tiun demokration al ĝiaj najbaroj.

Mi menciis la kazon de Kosovo, kiu bedaŭrinde estas preskaŭ tute ne konata de rusa popolo. Kosovo konsistas ĉefe el etnoalbanoj (pli ol 90%), kiuj estas neslava popolo. Ekde jarcento albanoj tie suferis diskriminacion multaspekton, eĉ genocidon kiu kulminis dum la jaroj 1998-1999. Se NATO ne intervenus albanoj tie pereus. Albanio estis mem malgranda kaj malforta lando.

Finfine la serba armeo kaj polico foriris kaj Kosovo fondis sian sendependan ŝtaton, sed ne kuniĝis kun Albanio. Tie ankoraŭ servas kelkmil soldatoj de NATO (antaŭ estis ankaŭ rusaj soldatoj) kaj same policistoj kaj juraj oficistoj fremdaj.

Kosovo aspiras eniri en EU same kiel Albanio. Laŭ la nova konstitucio la malplimulto tie ĝuas pli da rajtoj ol en ĉiu eŭropeca lando eĉ en EU!

Krom la albana oficialaj lingvoj estas ankaŭ la serba kaj la turka!

Ni esperu ke la situacio kvietiĝos danke ankaŭ al interveno de grandpotencoj.

Dankon pro konsidero,

via amike Bardhyl



Djordje Dragojlovich

> estis interese sekvi tiun ĉi diskuton, kiu de momento al momento ŝajnis tute perdi sian linion kaj forgesi la elir-temon... Krome, al ĉiuj partoprenantoj (ne rilatas tiujn kiuj hazarde enmiksiĝis) eblas riproĉi plurajn aferojn, unue la nekapablon, aŭ nesufiĉan kapablon eliri el la kadroj de siaj opinioj.

T.e. vi opinias, ke se la homo firme subtenas la veron k ne cedas al mensogoj k propagando, li estas riproĉinda?

Ke vi estimas nur tiujn, kiuj flirte ŝanĝas siajn opiniojn? Ke la rezulto 2*2 dependas de tio, ĉu vi vendas aŭ aĉetas?

> Krome, kun mia amiko Bardhyl ni povus diskuti pri kelkaj liaj asertoj, kvankam lian ĝeneralan aliron -- agnoskon de homaj rajtoj (mesaĝo de la 16-a de aprilo) -- mi subtenas. Dorota simple preteratentis iujn rektajn demandojn (kvankam ili, kun multaj aliaj, havas nenian rektan ligon kun la bedaŭrinda situacio en Ukrainio) direktitajn al ŝi... Kaj, sinjoro Melnikov.

> Do, li, kiu sendube estis motoro de la diskuto, meritas kelkaj vortojn pli ol aliaj. Ĝenerale, mi ŝerce povus diri ke sinjoro Lavrov povus emeritiĝi, jen kapabla posteulo.

Dankon pro la komplimento.

Lavrov, diference de Obama, estas persono saĝa k honesta.

(Ne mirindas, ke la ulo, trompe-kontraŭleĝe iĝinta prezidento de Usono, per falsigo de sia naskiĝ-atesto, pretas subteni aliajn kontraŭleĝajn potenculojn...)

> Kankam, Lavrov kion diras faras tion kiel lian ofican devon, dum Melnikov, ŝajne, foje ion diras ĉar simple ion tiel vidas, ne estante en pozicio rigardi aferojn ankaŭ de iu alia flanko, Kion li nun dirus, kiam -- fine -- mem Putin konfesis ke rusaj soldatoj dekomence estis en Krimeo? Tute ne gravas en kiaj uniformoj...

Mi jam diris kelkfoje (sed mi ne memoras, ĉu ankaŭ ĉi tie), ke rusiaj soldatoj troviĝis en Kriemo ĉiam; ekde "sendependiĝo" de Ukrainio ilian staton reguligas speciala kontrakto, laŭ kiu Ukrainio ĉiujare ricevadis de Rusio grandegan sumon.

La reala kvanto de tiuj soldatoj eĉ neniam atingis la permesatan laŭ tiu kontrakto (ĉ. 20 aŭ 25 miloj, mi ne memoras ĝuste).

Ĝuste ilia ĉeesto ebligis, ke Krimeo sukcesis tute pace, sen sangoverŝo restarigi historian justecon.

Ja Krimeo estis rusa k antaŭ 100, k antaŭ 200 jaroj...

Rusiaj soldatoj ne faris eĉ unu pafon.

96% de Krimeanoj voĉdonis por aliĝi al Rusio. Sen trudo k perforto.

Oni povus perforte devigi homojn voĉdoni aŭ falsigi la rezulton - sed ne eblas perforte devigi homojn ĝoji, kanti k danci sur placoj dum horoj, festante la liberiĝon, kun sincera feliĉo sur vizaĝoj...

En orienta Ukrainio la situacio estas alia.

Tie NE estas rusaj soldatoj - k ĝuste pro tio tie ukraina armeo militas kontraŭ propraj civitanoj.

Se tie estus rusaj soldatoj - ukraina armeo tuj panike fuĝus, ja ĝi kapablas pafi nur al nearmitaj propraj civitanoj.

Absurde k ridinde-plorinde, la ukraina armeo dum jaroj de "sendepenteco" estis komplete disŝtelita. (Ukraina suboficiero-intendanto estas tradicia figuro en anekdotoj, simbolo de ŝtelemo)

Fine nenio restis el sovetiaj rezervoj.

Nun oni "patriote" kolektas monon por subteni tiun armeon. Kiucele? Ke ĝi povu subpremi tiujn, kiuj donis tiun monon...

Nun oni pelas tankojn k aviadilojn kontraŭ la popolo, armita plejbonokaze per ĉasfusiloj k bastonoj. Sed ne povas venki: ja pluraj oficiroj, konservintaj iom da honesto, rifuzas murdi propran popolon.

Intertempe okcidentaj politikuloj kulpigas Rusion, ke ĝi ne volas malstreĉigi la situacion en orienta Ukrainio.

Nu, Rusio ja povus fari tie ordon, tre rapide k sen murdoj - sed la rezulto certe ne plaĉus al la okcidentaj sponzoroj de ukraina puĉo...

> Mi mencias nur du asertojn de sinjoro Melnikov, sen tro da argumentado. Rusio, diference de Usono k Germanio, neniam vivis el ekspluatado de aliaj landoj, nur per propra laboro, diris li, Mi memorigus nur la, ek de 1991 jam ne ekzistanta Konsilo por reciproka ekonomia helpo (aŭ kunlaboro), angla Comecon (Consil for Mutual Economic Assistance) ruse SEV (Sovet Ekonomicheskoy Vzaimopomoshchi), fondita en 1949, kiu sendube havis ankaŭ bonajn trajtojn, sed la ĉefa ĝia celo estis altrudi la sovetian ekonomian sistemon kaj certigi ĝian superan pozicion -- pri kio ekzistas biblioteko da literaturo.

Kiel tio malpravigus mian tezon?

Ĉu Rusio perforte k senpage prenis iujn produktojn de Pollando, GDR aŭ Jugoslavio?

Ja male, ĝuste USSR subvenciis la socialismajn landojn. Eĉ se, vi diros, por propagandaj celoj.

La kunlaboro en SEV estis profita por ĉiuj, sed por USSR, evidente, malpli ol por la ceteraj landoj.

Pri Jegor Gajdar - eble sekvafoje. Mi nur memorigu, ke mi konis lin persone ekde infanaĝo, lernis en sama mezlernejo.

> Fine... Problemojn de Ukrainio kaŭzis nek Rusio, nek EU, nek Usono: ili ĉiuj nur enmiksiĝis, sekvante siajn interesojn, dum la esencaj problemoj estis enlandaj. Same kiel ĉe disfalo de mia iama lando: ni

mem, ne kapablante solvi la problemojn, preparis la terenon por la enmiksiĝo de aliaj. La rezulto videblas, Ĉe Ukrainio, ŝajne, antaŭvideblas.

Pri tiu alineo mi povas konsenti.

- Mi ĝojas ke ni konsentas pri la lastaj alineoj de mia antaŭa mesaĝo, ĉar en ĝi mi esprimis la kernon de la problemo, kiel mi ĝin vidas. Ĉio alia malpli gravas...

Ŝajne ke ni ne ĉiam komprenis unu la alian: eliri el la kadroj de siaj propraj opinioj por mi signifas konfesi kiam mi (ne grave pro kio) ne pravis -- kaj ĝuste pro tio mi menciis tion, ĉar mi tiun kapablon ne vidis, ĉiuj per ĉiuj fortoj intencis altrudi siajn asertojn, kvankam videble ne ĉiam ili pravis (tute negrave rilate la temon, sed por Katyn ne povas samtempe kulpi kaj la germana, kaj la sovetia parto, sed neniu volis retiriĝi; por ne paroli pri la fakto, ke la historiistoj jam solvis la plej gravan dilemon).

Alie. Ekzemple, *Ja male, ĝuste USSR subvenciis la socialismajn landojn* skribis Vi. Do, kiam finiĝis tiu SEV-a periodo, kiun karakterizis, interalie, la modelo de tn. duobla interkalkulado (ĉar ekzistis nek komuna, nek konvertebla mono), la ŝuldo de USSR al tiama Jugoslavio estis ĉ. miliardo da dolaroj. Cetere (pardonu se mi eraras, sed mi alian informon ne havas), problemo de tiu ŝuldo ankoraŭ ne estas solvita.

Rilate rusiajn soldatojn... nek mi pensis, nek Putin parolis pri tiuj kiuj estis tie laŭkontrakte, sed pri tiuj kiuj estis en Krimeo, armitaj, sed sen ajnaj signoj. Tion li konfesis!

Vi verŝajne pravas, dirante ke *ne eblas perforte devigi homojn ĝoji, kanti k danci sur placoj dum horoj*, kaj tio, kiel mi povis informiĝi, ne okazis en Krimeo. Mi diras verŝajne nur pro la fakto ke mi tamen vidis tiajn bildojn, sed - eh! - el Pjongjango.

Mi entute ne komprenas kial Vi enmiksas la jam tute forgesitan, eĉ de tiuj kiuj lanĉis ĝin, la aferon de kvazaŭ falsigitaj naskiĝ-dokumentoj de Obama. Unue, tio havas nenion ligan kun la temo, due, kiel mi diris, tiun elpenŝaĝon lasis jam eĉ tiuj kiuj produktis ĝin - kial do Vi devas insisti pri ĝi?

Koraj salutoj,
Djordje

Beletraĵoj

Rakonto

Dritero Agolli8

Sovaĝeco

Ĉi tiu rakonto estas verkita en la jaro 1964, dum la periodo de la totalisma reĝimo, enkadre de la libro "Bruoj de la iamaj ventoj", sed la cenzuro tiutempe malpermesis la publikiĝon.

La vivo iamfoje estas terura, mia amiko. Kelkajn dumvive trafis pli malfeliĉega sorto ol tiujn falintaj dummilite, mia amiko... (ĉerpita el iu konversacio)

1

Mia ĉevalo haltis antaŭ la pordon je alta flankmuro. Ulo varmiĝanta sub la sunradioj kune kun granda sed maldika hundo, vidis min timigite kaj leviĝis.

8 Dritero Agolli estas unu el la elstaraj albanaj verkistoj nuntempaj, eksa prezidanto de la Ligo de Verkistoj kaj Artistoj de Albanio dum la totalisma reĝimo

-Mu-mu-mu!- eldiris li ion nekomprenoblan kvazaŭnaze kaj puŝis la pordon. Ankaŭ la hundo postsekvis lin kaj sin kaŝis malantaŭ la pordo. Post iome, la pordotabulo denove malfermiĝis kaj mi ekvidis vizaĝon malrektiĝintan kaj longan langon elstarinta tra du dikaj lipoj kiel hepaton.

-Mu-mu-mu,- faris du dikaj lipoj kiel hepaton. Ankaŭ la hundo eligis sian malbelan kaj dormeman faŭkon kaj ĵetis sur min indiferentan rigardon.

- Kiu estas ĉi tiu salutanta min tiel delikatece?- diris mi al la akompananto, elĉevaliĝinta jam kaj ridanta.

-Gani, Gani! Ĉi tiu kamarado volas forŝteli vian hundon!- alparolis la akompananto al la homo kun hundo.

-Vi demandas kiu li estas?. Ĉu vi ne aŭdis jam pri Gani Bredhi?- turniĝis li al mi- Gani Bredhi estas fama ĉi tie.

Kaj tiam, tra tiu malnova pordo je putriĝinta pordotabulo, alfiksis per ladaj pecoj, antaŭ miaj okuloj ekfluis vivo je tiom da perturbaĵoj kaj kortremaĵoj. Kiom mi mem hezitas priparoli, ĉar ĝi verŝajniĝus terura, nekredibla fablo..

Okazis tie! Dum vintro ŝarĝita je neĝo, ĉi tien oni rimarkis kelkajn nekonatojn.

Komence, ili aperis kaj malaperis tra la pordo de tiu domo ŝoviĝinta je la rando de la monto, poste perdiĝis. La sama pordotabulo, dumvespere krakis kaj tra ĝin eliris homo kun sako surdorse. La homo surgrimpis la monton kaj revenis, kiam ankaŭ la monto ekplonĝis en la mallumon, same la domo kun kortomuro, kaj la pordo je putriĝinta tabulo.

Iutage alvenis antaŭ la pordo tri viroj kun aŭtomataj fusiloj, ili venis tra neĝo kaj vento. Ili frapis sur pordotabulon mordiĝinta de vermoj. Virino je flava vizaĝo kaj okuloj je viola cirklo, demetis la bolton kaj la viroj kun fusiloj eniris internen. Apud la fajrejo varmiĝis viro, kiu ekstariĝis ekvidinte la ĵus alvenintojn. Li estis altstatura kaj havis grandajn manojn. Restis silenta kaj malvarmsange.

-Je la nomo de la popolo vi estas arestita!- eldiris unu el ili.

La virino kaj knabo 12 jaraĝa, rigardis foje la viron, foje la triopon. La pordo malfermiĝis. La viroj kun fusiloj kaj la viro je manoj ligitaj malaperis en la blankeco de la neĝo disĵetiĝinta fare de la vento.

Pasis nelonge kiam la triopo kun fusiloj kaj la viro, ĉi foje je manoj liberaj, denove aperis ĉe la pordosojlo.

-Povas esti eraro!- diris unu el ili al la virino en la teraseto, dumtempe la aliaj du estis sidiĝintaj kun la dommastro apud la fajro, povas esti alia homo kiu alportis panon al diversantoj⁹. Tamen ni estis informiĝintaj ke ekzistas persono en la vilaĝo kiu ĉiun vesperon eliris el ĉi iu pordo kun sako surdorse..

La dekdujarulo aŭskultis kaj rigardis foje la patron, foje la anojn de Sigurimi.¹⁰ Juĝante laŭ la lia mieno li ne estis kontenta ke okazis tiel. Li ion volis eldiri, ion kion li eble delonge pripensis, sed

9 Temas pri albanoj kontraŭstariĝintaj al la nova komunisma reĝimo, parte trejniĝinaj eksterlande kaj enirintajn la patrion malkaŝe por saboti kaj renversigi la ŝtatpotencon.

10 Sigurimi –ŝtata sekreta sekurecforto

silentis. Tio vidiĝis en lia konduto, en lia atitudo, en lia vizaĝo. Rigardante lin, vi povus konkludi ke li ne estis simple dekdujarulo, sed matura knabo, je logiko kaj voloforto. La dekdujarulo diris: - Mi jam scias kiu estas la viro eliranta kun sako surdorse ĉiun vesperon; mi scias. Li enmetis en la sakon ankaŭ ŝafinaĵon, eĉ buĉitan virŝafon. Tiu estas ja mia patro. Mi komprenis jam. Li vivtenas la diversantojn per mano.

La viro ekstariĝis, tuj forkaptis la spadon kiu estis ĉe la angulo kaj sin ĵetis al la infano. Aliaj du kaptis lin. La edzino glaciĝis surpiede. Liaj manoj denove kateniĝis..

2

Ok jaroj pasis en la korto de tiu domo ne sentante la voĉon de la dommastro. Same en aŭtuno, kiam fagoj ekfaligis la foliojn sur la malnovan tegmenton, unu el la pordotabuloj malfermiĝis kaj en la korton eniris la viro. Li estis maljuniĝinta, la okuloj estis profundiĝintaj kaj la kapo estis tondita. Revenis li de la prizono. La knabo, jam dudekjarulo, ĉirkaŭbrakis lin, la virino ridetis. La viro staris malvarma. Ok jaroj for de la propra fajrejo, ok jaroj!

Nature tio estis ĝojo, li revenis en sia kameno, fajrejo, eksentis la agrablan bonodoron de la hejmo samkiel la haladzon de la kverkaj brullignoj en la fajrejo, eligintaj dolĉan fumon.

Dum la vesperoj li sidis apud la fajro plenigante kaj malplenigante la cigaredujon, pensante kaj memorante ion foran. Li parolis malmulte kaj ne rigardis la filon rekte al la okuloj.

Li kaŝis en si koleron kiu bolis sovaĝe, furioze, kaj atendis la okazon por eksplodi, eĉ se tiu kaŭzo estus malgranda. Iamfoje, indiferenta fajrero falis sur la stakon de seka herbo kaj ekbruligis grandan fajron, kiun eĉ se la tuta vilaĝanaro ariĝu, ne povis ĝin estingi.

- La tonditaj haroj estas kreskiĝantaj, patro!- diris al li iuvespere la filo, sidante kun li apud la kameno. La patro ne parolis, nur levis la brovojn. Kiam la virino ekridis, li kriis:
- Ne faru ŝercon kun mi! Ci ne ridetaĉu!-diris li al sia edzino ne rigardante la filon.

Ekpluvis. Guteto da pluvo ekfaladis mezen de la grundo. La patro staris apud la fenestro, rigardante la pluvon falanta kaj sentante la frapeton de la pluvero sur la bolkrucio kiun la dommastrino estis metinta tien por ke la grundo ne akvumiĝu. La viro sin turnis al la filo, ne rigardante lin per okuloj.

- Dimanĉe mi vendos la ĉevalon en la bazaru. Ni bezonas ripari la domon- diris li.
- Sed baldaŭ kooperativo¹¹ disdonos la enspezojn al siaj membroj- diris la filo,- do ni havos monon, kial ni vendu la ĉevalon?
- Ah, atendu azeno ĝis ekaperu la herbo! Diamanĉe mi vendos la ĉevalon!- ripetis la patro per nediskutebla voĉo.
- Sed mi estas promesinta doni la ĉevalon al kooperativo- diris la filo.

La viro tuj sin turnis al la filo.

-Mi jam diris ke mi vendos la ĉevalon dimanĉe. Finite. Senvorte.,-diris li.

- La ĉevalo estas ja la mia,-diris la filo.

- Kiu do estas dommastro ĉi tie, mi aŭ vi?- konstrikta la rompiĝintaj dentoj la patro.

- Ne interesas tio al mi. La problemo estas: mi petas vin lasu la ĉevalon,- diris la filo.

11 Kooperativo- agrikultura kolektiva labororganizaĵo kiu ekspluatis la laborfortojn de la vilaĝanoj dum la tempo de socialismo

En la ĉambro aŭdiĝis nur la akvero falanta en bolkruĉon. Patro kaj filo rigardis unu la alian en la okuloj kaj dum momento silentis, eĉ ne enspiris kelkajn sekundojn.

- Kanajlo!-ekkriis la patro denove kaj premis sur la cigaredujon per forta mano.

La filo denove ne respondis.

- Kanajlo-kriis la patro triafoje.- Mi estas farinte la kapon vian, ci volas konduki kun mi laŭplaĉe. Ok jarojn mi restis en la prizono pro ci! Ci igis min ne aŭdaci rigardi la homojn en la okulojn..

- En la prizono ne enigis mi, sed via kapo,- diris la filo, ekrigardante sian patrinon, kiu estis stariĝinta kaj rigardinta terurigita. Tiu rigardo demandis apogon en la okuloj de la patrino.

- Kanajlo!- kriis ankoraŭfoje la altstatura viro.

- Sufiĉe, ĉar la tuta kvartalo eksciis nian aferon,- diris la filo kaj tentis eliri eksteren.

Sed la patro kaptis lin je la jakmanikoj per dika mano kaj skuis lin. La filo klopodis eskapi de tiuj potencaj brakoj. La maniko restis en la manoj de la patro. La patrino sin ĵetis mezen de ili por apartigi ilin. La viro etendis la brakon kaj forkaptis longan stangon, kiu staris ĉe la ĉambroangulo. Li levis ĝin kiom li povis kaj ĵetis sur la kapon de la filo, sed tiu lasta iomete moviĝis, tiel la stango frapis ties dekstran brakon. Aŭdiĝis peza eksplodeto, kvazaŭ io rompiĝus. La filo falis surteren senkonscie.

Aŭdiĝis nur la akvero falanta sur la bolkruĉon...

..Tutan semajnon, kuŝanta sur matraco, li ne parolis. Post semajno, li komencis ellasi sensencajn sonojn. Unu brakon kaj unu kruron li apenaŭ povis movi. Se vi manĝigus lin, li manĝis, kontraŭe li ne manĝis mem. La patrino manĝigus lin per kulero.

- Mu-mu-mu,- respondis la filo.

Alveninta kuracisto, vizitis lin, kaj diris ke la filo plurestos tutan vivon idioton. Pasis malmulte da tempo, kiam lia afabla vizaĝo komencis ricevi alian vidon.

3

La patro forlasis la vilaĝon kaj laboris monaton en la arbaro. En tiu arbaro patro trinkis dekojn da kilogramoj da tabako, poste li iris labori kiel ŝtonrompiston en foran ŝtonejon, pretiganta ŝtonerojn por pavimi la stratojn. Sed finfine, li revenis hejmen, ankoraŭ pli faltiĝinta, ankoraŭ pli nubiginta, ankoraŭ pli silentema. Li absorbis la cigaringon en la kameno. La idioto flusalivplena sidis en la angulo de la ĉambro kaj faris "mu-mu-mu".

-Ni riparu la alian ĉambron. Mi ne povas kunsidi kun ĉi tiu,-diris la edzo al sia edzino. – Mi ne povas!

-Mu-mu-mu,-faris la idioto.

La vento frapis sur la vitrojn. La lampo bruliĝis en la rando de la kameno. La idioton kaptis la dormo tie, ĉe la angulo de la ĉambro. Li kuŝis surdorse, estis malferminta la buŝon kaj el ambaŭ lipoekstretoj eliris flusalivo. La viro fumis. La violkoloraj cirkloj de la okuloj de la patrino fariĝis pli grandaj.

La geedzoj estingis la lumon kaj endormiĝis. La filo murmuris dumdormo:

-Mu-mu-mu!

La patro fermis la orelojn permane.

- Mi ne povas plu aŭskulti lin!-kriis li.
- Mu-mu-mu!- respondis la filo.

Kaj tiam li eksaltis de la matraco, sin vestis kaj ĝis mateno sidis apud la kameno. Li dezirus iri al kelkiu amiko, por babili, fumi kune, sed en la vilaĝo ĉiuj estis abandonintaj lin. Eĉ, kiam li eliris sur straton, la virinoj rigardis lin el la fenestroj kaj flustris:

-Jen li!

Kaj li ja sciis ke la homoj ne prikonsideris lin, ne amis lin. Lin penigis ilia silento, kiam li renkontis ilin hazarde surstrate. Tio estis sovaĝa, malesperiga, trista, maldolĉa silento. Ili silentis kaj konsideris lin fiulon. La veron dirante, estis ankaŭ aliuloj kiuj estis dirintaj rekte al la okuloj ke ili malamamis lin kaj eĉ ne volis pluvidi lin en la vilaĝo.

Iutage li malaperis. La loĝantoj de la vilaĝo ne vidis lin plu eliri sur la stratetoj de la vilaĝo. Lin estis vidinta nur la arbargardisto, kiu estas trovinta lin pendigita sur iu pratempa fagobranĉego per la rimeno de siaj pantalonoj. Li pendigintis sin. Tiel finiĝis tiu historio, la historio de Gani kaj ties patro.

Ni surĉevaliĝis kaj nin kaŝis en la densa arbaro.

Enesperantigis Bardhyl Selimi

La gitaro

Verkita de Gezim Ĉela¹²

“Forpreninte el la homo ĉion, li ne plu estas en via mano. Li estas liberulo”

Aleksander Solĵenicin

En iu angulo de la tendaro - prizono, ĉirkaŭita de pikdratoj, sonoris la doloraj sonoj de la gitaro de Vaĉe¹³. Tiutempe, la tendaroj - prizonoj translokiĝadis de unu loko al la alia. Mi eniris unuafoje tian tendaro - prizonon en la jaro 1957 kiam konstruiĝis la aeroporto de Rinas.¹⁴ Poste oni nin sendis por irigacii la marĉon de Thumana¹⁵. Fine la tendaro - prizono instaligis en la ĉefurbo mem, por konstrui tutan domblokon nomita “Puna” (Laboro), ĉe la bordo de la rivereto Lana. Tiamtempe, estis la jaro 1962, ventetis iom da liberalismo ankaŭ en la prizonoj. Tiel oni permesis nin uzi ankaŭ muzikilojn en la ĉambro nomata kulturejo kiu servis ankaŭ kiel bibliotekon.

¹² Eksa politika enprizonulo dum la komunisma reĝimo en Albanio

¹³ Vaĉe Zela, unu el plej elstaraj kantistinoj albanaj dum 1960-1980 jaroj.

¹⁴ La aeroporto “Patrino Tereza”, je 15 km for de ĉefurbo, Tirana.

¹⁵ Thumana, vasta kampo, je 40 km norde de ĉefurbo, Tirana.

La komandejo alportis mandolinon (specon de gitaro) kiu antaŭe uzatis en militista taĉmento. Sotiraq Tase¹⁶ estis vera muzikisto kiu ludis tre bone per la dratoj de mandolino, donacante nin plezuron. Li diris al mi iutage: Kiom bone estus se ni havus gitaron, por akompani la melodian linion kun akordoj!

Ĉi tie komenciĝas la historio de la gitaro de Vaçe. Dum renkontiĝo kun la patrino, mi petis ŝin diri al nia konato, Mehdi Prodani, trovi gitaron por ni. –Bone, jesis la patrino, mi faros tion!

Tiel ni atendis senpacience la alvenon de la gitaro. Kaj envere, post du monatoj, kune kun kelkaj nutraĵoj, la patrino alportis ankaŭ gitaron. Ni ege ĝojis je tio, same la patrino plenuminte la deziron de sia sola filo. –Ĉu vi ricevis ĝin de Mehdi? - demandis mi la patrino.- Ne- respondis ŝi- tion donis al mi mem Vaçe, estis ja gitaro ŝia. Dum Mehdi havis nur unu gitaron por si mem. Kiam hazarde mi renkontis Vaçe surstrate, ŝi interesiĝis pri vi. Tiam mi menciis ankaŭ vian deziron rilate la gitaron..

Do Vaçe senhezite estis ofertinta sian gitaron por mi. Tio duoble kontentigis min. La familion de Zela ni konis delonge. La patrino estis translokiĝinta al Lushnje¹⁷ ekde la jaro 1945, post kiam mia patro, eksa prefekto en la antaŭa reĝimo, estis devigita forlasi la patrion. La patrino mia, nomata Roza, deĵoris kiel akuŝistino 20 longajn jarojn en tiu urbo, pro kio la lokanoj nomis ŝin Roza de Lushnje. Tie pasigis ankaŭ mi la infanaĝon kaj junaĝon kaj fondis sociajn kaj amikajn rilatojn kun vico da artistoj, kiuj poste fariĝis famuloj kiel verkistoj aktoroj kaj kantistoj: Vaçe Zela, Margarita Xhepa (Prifti), Ilia Shyti, Vath Koreshi, Paulina Mani (Prifti), Loni Papa, Faslli Haliti kaj pli malfrue la fratinoj Libohova (Irma kaj Eranda) kaj multaj aliaj. Lushnje estas envere mirinda urbo!

Tiel la mandolino de Sotiraq kaj la akordoj de la gitaro de Vaçe ĉiun vesperon plonĝigis nin en la mondon de la sonoj, en la songojn por mondo neigita al ni senjuste. Ĉe tiuj sonoj ni trovis rilaksiĝon post la laciga kaj teda laboro, tiuj sonoj vivtenis ĉe ni la esperon tiam, kiam oni minacis nin per mortigo.

Tiel okazis iutage, kiam iu inspektisto de la Ministrejo pri Internaj Aferoj alvenis en la tendaron por prelegi al ni politikan temon. Preleginte, li alparolis nin petante demandojn rilate la temon. Sed niaj demandoj eliris pli malpli de la tema kadro, ĝis tiomgrade ke li konsideris ilin malamikemaj, kaj nin mem nerekapabligeblaj malamikoj, minacante: Estu klara por vi, malamikoj, eĉ se venos la tago kiun vi atendas, vi ne ĝuus tion ĉar ni surmetos la tripiedon kaj pafmortigos ĉiujn el vi!

Per ĉi vortoj li foriris de ni, elirante de la tendaro ege incitita. Dum ni iris al la gitaro por malfermi la esperigan fenestron.

De la tendaro de Tirana ni transpasis al la tendaro de Rubik¹⁸ por konstrui la fabrikon de ellaboriĝo de kupro kaj fine en Laç¹⁹ por konstrui la fabrikon de granuligita superfosfato. Dume, la gitaro plurestis nia eterna akompananto.

16 Iu prizonulo

17 Urbo, sude de la lando, kie naskiĝis Vaçe Zela

18 Rubik kupra minejo norde de la lando, je 80 km for de ĉefurbo, Tirana.

19 Laç, nova urbo, centro de la enlanda kemia sterka industrio, je 54 km norde de ĉefurbo, Tirana

Estis proksimiĝante la tago de mia elprizoniĝo, post ok jaroj. La kamaradoj petis min lasi la gitaron al ili. Kiel mi povus rifuzi ilian peton? Ĝi jam ne apartenis nur al mi, sed fariĝis parto ankaŭ de miaj samsortanoj, des pli de ili, ĉar ĝi estis ia esperiglumo en la malluma tunelo de la prizono. Ĝi estis ja parto de niaj grandaj doloroj, same de niaj malgrandaj ĝojoj.

Post ses jaroj, en 1971, oni arestis denove min kaj kondamnis min je pliaj jaroj da enprizoniĝo. Kiam oni sendis min al Spaç20, mi retrovis tie la gitaron kaj kelkajn el miaj iamaj kamaradoj el la tempo de Laç, kiel Fiqiri Muho-n, al kiu mi estis enmaniginta la gitaron antaŭ ses jaroj. Fiqiri alparolis min: La gitaro similas al la virino, Gëzim, ĝi neniam forgesas sian unuan amon, tial ĝi estas serĉante vin.-

Mi rigardis atente kaj nostalgie la gitaron kiu ŝajnis diri al mi:- Kiam vi denove elprizoniĝos, kunportu min, ne lasu plu ĉi tie! Kvankam mi estas farita el ligno, mi estas lacigita kaj preferas pli la varmon de la hejmo kaj la spacojn de la libereco. Ĉi tie ege malvarmas!

La ribeliĝo de Spaç21, okazinta de 21-a de majo ĝis 23-a de majo 1973, skuigis ege la sistemon. La komunisma ŝtato ne povis pardoni tion; ĝi aplikis bestiece la teruran diktaturon je kompleta forto. Estis mortpafitaj kvar prizonuloj, imediate post 24- hora juĝproceso improvizita, dum min kaj multajn aliajn sekvis longa kalvaro de enketado kaj juĝprocesoj. Mi kondamniĝis je pliaj 15 jaroj!

Kiam mi revenis la tendaron post kelkaj monatoj, tie regis la ombro de morto. La homoj ne aŭdacis eĉ mallaŭte paroli, des pli oni ne povis mencii pri la gitaro. Tamen, mi petis mian kamaradon pri ĝi.- Kiam vi foriris, diris li, hordeo de kvazaŭlupoj vestite je militistaj uniformoj, perdinta iun ajn homecan sentemon, sub la gvido de vicministro, Feçor Shehu22, ekatakis nin kiel frenezuloj, forprenante de ni ĉion personan postlasita ĉe ni, kiel manuskriptojn, librojn, eĉ muzikilojn. Aparte ili traserĉis pri la gitaro ĉar volis rompi ĝin..-

Mi kortremiĝis pri la sorto de nia gitaro, sed la kamarado trankviligis min.- Mi estas savinta ĝin. Mi eligis ĝin el la tendaro kune kun rubaĵkestoj kaj kaŝis ĝin en la plafonetoj de la galereo, en la areo nr.3.

Post kelkaj monatoj, kiam en la prizanon returniĝis la normala reĝimo kaj ni rekomencis labori en la minejo, mi eligis la gitaron el la galereo kaj kunportis ĝin kiam mi elprizoniĝis. Ĝi estas nun 22 jara prizonulo, tiom kiom ankaŭ mi mem. La gitaro de Vaçe daŭre kunestas kun mi en mia hejmo hodiaŭ.

Gezim Çela23

20 Terura tendaro - prizono en la kupraj minejoj en profunda montaro en nordo, je 120 km for de ĉefurbo, Tirana.

21 Evento eksterordinara en la komunismaj politikaj prizonoj de Albanio, submetigite sangume de reĝimo.

22 Mortpafita post dek jaroj de la reĝimo enkadre de milito ene de specio, aplikata en la eksaj komunismaj diktaturoj, kiel “malamikon de Partio”.

23 Eksa politika prizonulo dum dudek jaroj en la totalisma reĝimo. La rakonto estas aŭtentika. Kiel ĉiuj prizonuloj ankaŭ Gëzim laboris devige en multaj objektoj industriaj, minejoj, eĉ en la aeroporto de Tirana

La vero pri la usonarmeaj aviadilo "kaptita" en Albanio

Je la fino de la jaro 1957, la ĉefa dromo de la konstruota aeroporto de Tirana²⁴, post kelkaj jaroj da teda kaj peniga laboro, estis finkonstruita. Oni ne eligis plu nin en la laboron. La tendaro estis ĉirkaŭita per matoj kaj pikdratoj por ke la eksteruloj ne povu envidi la prizonulojn. Ankaŭ la gardistoj sur la gardoturoj ekservis malsupre. Unuafoje ni ekĝojis plilongigitan ripozon. Je fruoktobro alteriĝis tie la unua aviadilo "Tupolev"²⁵ per kio komenciĝis la portempa funkciado de la dromo. "TU" alvenigis je oficiala vizito la tiaman ministron pri defendo de Sovetunio, Ĵukov, kaj la faman aviadilkonstruiston Tupolev. Okazis solenaj akceptoj kaj honorigoj fare de la albana registaro kaj komunista gvidantaro. Post kelkaj tagoj, la gastoj revenis hejmen kune kun la aviadilo "TU".

Je ironio, post vizito al Albanio Ĵukov estis depostenigita de Ĥruŝĉev²⁶.

Tuj poste, finiĝis ankaŭ nia ripozo. Ni rekomencis la laboron. Oni demetis la matojn kiuj kaŝis la tendaron. Nin atendis grandega kaj peniga laboro por betonigi la flankajn vojojn, restadlokojn kaj la terminalon. Alta monto je ŝtonetaro, portenda al la alia flanko, troviĝis en la orienta rando, apud la dromo kaj la tendaro. La transporto estiĝis per vagonetoj sur la reloj, kiujn ni plenigis per ŝoveliloj kaj puŝis per brakoj, je 34 vagonetoj po tage.

Iutage, dum ni estis laborante kiel terformikoj sur la dromo, aŭdiĝis surdiga bruo de ĵetaviadilo, aldirektita al nia dromo. Je nia miro, ĝi estis alproksimiĝante terure al ni. Sed, per akrobata devojiĝo ĝi preventis la kunfrapiĝon al alta gardoturo ĵus meze de dromo, kie staris armita soldato, transpasis tute malalte super la unuan relvicon, kie cirkuladis la vagonetoj, kaj antaŭ ol kunfrapiĝu al la dua relvico, post kiam la radoj estis jam ektuŝintaj la dromon, devojiĝis je 90 gradusoj kaj haltis.

Ni rigidiĝis gapante kaj ŝokite. Ne estis klara al ni, kio estis okazanta, kion volis tiu aviadilo ĉe ni, kiu eĉ endanĝerigis la homvivojn.

Tuj, je direkto de aviadilo, alpaŝis la deĵoranta oficiro, kiu atinginte ĝin, ekvidis altstaturan piloton elirante el lia pilotejo. La oficiro demandis lin laŭtvoĉe:

- Kiu vi estas?

- I am american!²⁷- respondis angle la piloto.

La oficiro ekaŭdinte la vorton "amerikan", ege rabiigite, returniĝis kaj ekkriegis:

- Subite donu al mi aŭtomatikon! Rapide aŭtomatikon!

Sed liaj kriegoj estis senvaloraj, ĉar la armiloj estis ekster la ĉirkaŭaĵo de la tendaro. La oficiro ekkuris je direkto de la komandejo. La usonano plusidis sur sia seĝo surprizigite kaj ne komprenante kio estis okazanta. Dum ni, iom post iom, ekkomprenis ke la aviadilo estis usona, ĉar sur la korpuso kaj

24 Ĉefurbo de Albanio

25 Nomo de fama sovetunia aviadilkonstruisto

26 Eksa Unua Sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio.

27 Mi estas amerikano (sinonimo de usonano)

subflugile ĝi portis la blankan stelon kaj je flankoj du strioj, dum sur la antaŭa parto klare distingigis la literoj "USAIR FORCE".²⁸

Peza silento envolvis nian medion, estis ĝi ia sento de ĝojo, fierumanta nin, kial ne, ankaŭ ia espero, ekvidante la blankan stelon. La deĵorantaj policistoj iris kaj revenis konfuzitaj, ne sciante kion fari, atendante ordonon desupre, kiu ja venis el la komandejo:

- Ĉiuj prizonuloj foriĝu disde la dromo.

La policistoj ekfajfis forte, signalante ke ni lasu la laboron kaj enviciĝu po du, ĉar tiamaniere oni povus nombri nin. Oni enigis nin haste en la tendaron kaj plifortigis la gardistaron.

La tendarestro, Beqir Bala, akompanata de vico de oficiroj kaj policistoj, aldirektiĝis al la dromo, por ke ekkonu la situacion. Oni alvokis inĝeniron Zama (prizonulo) kiel interpretiston. La usonano komencis ekspliki kiu li estis kaj kial li troviĝis tie. Tuj poste oni kondukis lin al la komandejo. Post du - tri horoj, aperis, je la antaŭa parto de la dromo du veturiloj de la Ministrejo pri Internaj Aferoj kiuj aldirektiĝis al la komandejo.

Post iome, kune kun la piloto, ili foriĝis je direkto de Tirana. Posttagmeze, kelkaj albanaj pilotoj komencis kontroladi detale la aviadilon, sed la pilotejon ili ne sukcesis malfermi. (tion ili faris la morgaŭon, kune kun la usona piloto). Reveninte, inĝeniero Hasan Zama, ĉirkaŭiĝis de ni ĉiuj kaj estis bombardata de niaj demandoj por eklerni tion, kion estis okazinta.

Kio estis okazinta? La aviadilo ekflugis de Italio al Grekio, sed dumvoje ĝin trafis paneo kaj ĝi estis devigita alteriĝi ĝuste en Rinas²⁹. Verŝajne la piloto estis lerninta ke la aeroporto funkcias, ekde la alteriĝo de "Tupolev".

Oni diris poste ke la piloto forlasis Albanion, dum la aviadilo plurestis sur la dromo, malhelpante tiel la daŭrigadon de laboraĵoj. La tendarestro alvenis ĉe nin kaj diris humure:

-Venu, malamikoj kaj puŝu la aviadilon vian. Estas ĝi donacaĵo de Usono por vi!

Ni puŝis la aviadilon tra la kampo de Rinas ĝis, finfine, post kelkaj jaroj da restado tie, oni transportis ĝin al la Muzeo de la Armiloj en la suda urbo de Gjirokastër³⁰ kiel "militakiraĵo" kaj "venkosigno" de nia aviadilaro kontraŭ la usonan imperiisman kaj NATO-n.

Enesperantigis Bardhyl Selimi

Efrosina

(Fragmento el la libro "La Leono de Janino" de William Palmer)

28 Aerfortoj de Usono

29 Loko je 25 km for de Tiana ke estas la aeroporto, kiu nomigxas hodiaux "Aeroporto Patrino Tereza".

30 Urbo en la sudo

..Tiutempe vivis en Janino³¹ juna virino, tre bela kaj saĝa, nomata Efrosina. Ŝi estis 28 jara, edzinigita, naskinta du gefilojn. La edzo estis greka komercisto, vojaĝanta ofte al Venetio pro laboro, kie li restadis longajn tempojn.

Se Efrosina estis naskiĝinta multajn jarojn antaŭe, ŝi certe ekbrilus kiel brilanta korteganino de la altaj socitavoloj, aŭ se ŝi apartenus al pli liberala civilizo, fariĝus salona sinjorino. Sed, kion fari, tiutempe oni apenaŭ aprecis la inteligentecon de la virinoj!

Dume, Muftaro, filo de Ali Tepelena, paŝao de Janino,³² rimarkis ŝin surstrate kaj tuj enamiĝis al juna virino, kiel tio okazis ofte al li. Profitante de malĉeesto de la edzo, Muftaro proponis senpere al Efrosina amaron kio ne povis rifuziĝi de tiu lasta. Do, Efrosina ekestiĝis kaŝita amantino de la paŝaa filo. Ŝi eĉ orgojlis ke estis alloginta la pliaĝan filon de la plej grava tiutempa reganto de la vasta regiono.

De tago al tago, la amo de Muftaro pliiĝis kaj li pasigis longajn horojn kun ŝi.

Lia edzino, Paŝo, praktike estis forlasita de sia edzo, kio vekis la ĵaluzan angoron ĉe ŝi. Ankaŭ Efrosina estis ege frenezigiĝinta pro amo de Muftaro. Iunokte ŝi rimarkis sur la fingro de sia amanto tre belan ringon enteninta tre valoran juvelon kaj tuj petis Muftaron ke li donacu ĝin al ŝi, kio ne rifuziĝis.

Post kelke da tempo, ŝi mendis arĝentiston por ke li aĉetu aŭ revendu la ringon, je ŝia favoro. Tiu lasta, sciante ke similajn multekostajn ringojn portis nur altrangaj sinjorinoj, montris ĝin al Paŝo, edzino de Muftaro. Kompreneble, Paŝo rekonis tuj la ringon de sia edzo kaj devigis la majstron konfesi pri la ties proprietulo. Sciigiĝinte pri Efrosina, ŝi terure ekkoleriĝis decidante ekstreme venĝi kontraŭ ŝin.

Bonŝance, Muftar tiutempe estis marŝinta for de Janino en la batalo ordonita de Sultano, kaj mem Ali, estis ŝajniginta sin malsana, por ke ne forlasu Janinon kie li havis multe da zorgoj politikaj.

Paŝo iris rekte al la paŝao kaj eldiris ĉion al li, rilate Efrosinan. Kune kun ŝi estis ankaŭ la bofratino Zubejde, edzino de Veli, alia filo de Ali.

Ali promesis al ambaŭ novedzinoj ke li nepre venĝus por Paŝo.

Tiun noktomezon, li, akompanata de siaj gardistoj, eniris la hejmon de Efrosina, tiel en mallumo kun lanterno enmane. La virino, timigita, eksaltis el la lito kaj vidante grandan paŝaon, ekkaptiĝis de granda angoro.

Ekvidinte la ringon, Efrosina perdis iun ajn esperon por saviĝi. Ŝi surgenuis antaŭ la paŝao kaj petegis lin ploreante por ke li pardonu ŝin pro tiu kulpo, akceptita jam de ŝi mem. Ŝi promesis doni al Ali ĉion valoran kion ŝi posedis hejme. Ali akceptis. Sed, elirante, ordonis la gardistojn ke oni ligu Efrosinan kaj forportu ŝin al la terura prizono de Buldruno³³, permesante ke ŝin akompanu nur la servistino.

31 Urbego en Grekio, apud la landlimo kun Albanio, iamtempe centro de granda provinco turka loĝata plejparte de albanoj.

32 Ali Paŝa Tepelena, eminenta albana feŭdulo reginta ĉirkaŭ duonjarcenton vastan teritorion de Albanio kaj Grekio, strebinta al plena aŭtonomeco disde Sultano. Mortis en la batalo kun osmanoj en la jaro 1823.

33 Fifama prizono apud la hejmo de Ali Paŝa

Morgaŭon, ŝi petis Paŝon se estis ankoraŭ aliaj similaj virinoj en la urbo. Sekve li notis ĉirkaŭ 15 nomojn de la virinoj, laŭ li, kulpaj pro malfideleco al siaj edzoj.

Kiam li estis divenanta kian specon de kondamno donu al la virinoj, venis la edzo de unu el ili kiu, surgenuinte, petegis paŝaon ke ĉi tiu pardonu sian edzinon.

- Kion vi diras - admonis lin paŝao, ĉu vi preferas havi malfidelan edzinon?!

La edzo jesis, kaj Ali, ridegante, pardonis la ties edzinon.

Ĉiujn ceterajn virinojn, inkluzive Efrosinan, oni elprizonigis, kaj tra subtera tunelo transpasis en grandan truon, de kie oni malsuprenigis ilin en la lagobordon³⁴, kie atendis la boatoj. La ĉielo tiunokte fulmis kaj tondris eksterordinare, tiomgrade ke la ploregoj kaj kriegoj de virinoj malfeliĉegaj apenaŭ aŭdiĝis. Post kiam oni enigis ĉiun virinon en grandajn linsakojn, enĵetis ilin en la profundan akvon. Tiel paŝao kondamnis la malfidelajn edzinojn.

Laŭ legendo, Efrosina kune kun sia servistino, profitante de malsingardemo de unu gardisto, manenmane, sin ĵetis mem en la lagon. Pli malfrue, ŝia kadavro entombiĝis decmaniere apud sovaĝa malnova olivarbo. La loko tie estas tre romantika kaj ŝia tombo ornamita per blankaj lilioj, transformiĝis en pelegrinejon.

La tempo laboris favore al la virino trompinta sian edzon kaj ege ŝatinta sin. Oni komencis trakti ŝin kiel kristanan martiron kaj militheroinon por la liberiĝo de grekoj. Oni kompilis pri ŝi legendojn, poemojn, kanzonojn kaj amromanojn plej legindaj por viroj kaj virinoj, kie historio kaj politiko havas sian gravecon, mem ŝi kovriĝis de mistera vualo. La infanojn oni elhejmigis, sed ilin savis la urba episkopo, kiu estis cetere la onklo de la patrino.

Elalbanigis Bardhyl Selimi

34 Temas pri bela granda lago de Janino